MEGYEI KÖNYVTÁR
GYŐR

HUNGARA VIVO

3
1982
13,– Ft

HUNGAROCOOP
H–1370 Budapest 5.
P.O.B. 334

HUNGAROCOOP Kooperativa Entrepreno

por Ekstera komerco

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIa jaro, 1982 n-ro 3
(103)

ENHAVO

1983: Universala Kongreso en Budapeŝto 82
Kongreso ĉe Balatono 83
László, I.: Zoltán Kodály – komponisto de sintezo 84
Balbin, J.: Vizaĝoj 85
Refoje pri teatro (S. *Ŝtimec*, P. *Thorsen*) 87
Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 3. 88
Golden, B.: Propono el Filadelfio 90
Bertók, L.: Kiel paŝo en neĝo (*Szabó*, I.) 91
Galambosi, L.: Rozolampoj (*M.F.*) 91
Csorba, Gy.: Mond' eĉ sen mi (*M.F.*) 91
Esperanto-memortabulo en Siberio 92
Esperanto-novaĵoj el Sovetio 92
Skuja, H.: La plej eta perlo de la mondliriko 93
Kibernetiko kaj la Internacia Lingvo 93
Rados, P.A.: Aŭtoro de kvin presataj libroj. Intervjuo kun I. Nemere 94
Nemere, I.: Kie vi estas? 95
Abonyi-Nagy, Á.: Gyula – urbo de SEU 96
Fejes, M.: Mihály Sárosi (1893–1982) 97
Fejes, M.: Esperanto – artperanto. Pri Hugo Landheer 98
Fábián, I.: Advento (*Szabó*, I.) 99
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 103
László, F.: Sistema mediprotektado en la baseno de Tata 104
Doktor, J.–*Fiatal*, D.: El la sekretoj de la magia kubo... 110
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 112
Bálint, Sz.: Sub la turka jugo 113
Takács, I.: Malplena vortaro 114
Recenzoj de J. *Varga*, G. *Mihalkov*, M. *Fejes* 115
Krucenigmo, Ekzameno sen risko, Korespondi deziras 119
Leterkesto 120

Sur la titolpago: trupo de geaktoroj el „Cu Vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?" Unua vico: Ildikó Pécsi, Rikardo Horváth, László Romhányi (regisoro); dua vico: Levente Moravetz, Zsigmond Fülöp, Denise Kárpáti, Józsa Hacser, Csilla Herceg; tria vico: Kálmán Szabó, Lajos Tándor. Foto de Z. Fejér.

UEA kongresos...

en Budapeŝto venontjare; la 68-a Universala Kongreso do okazos en la hungara ĉefurbo, inter la 30a de julio kaj 6a de aŭgusto 1983 – certe tio estas la plej grava novaĵo en nia nuna numero: pli detale legu pri tio sur la paĝo 82. Kaj sur la sekva paĝo legeblas artikolo pri okaz*int*a kongreso de fervojistaj esperantistoj.

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis la elstara figuro de la hungara muzikarto, Zoltán *Kodály*. Certe ĉiuj muzikamantoj volonte legos pri lia agado. Ni daŭrigas la serion «Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado», kiu jam per la unua peco trovis favoran reeĥon ĉe la legantoj. Du eksterlandaj spektintoj sendis al ni siajn impresojn pri la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj; pri tiu grandsukcesa aranĝo – ripetota venontmarte – memorigas cetere ankaŭ la kovrilpaĝa foto. Bernard *Golden* publikigas interesan historian dokumenton el la frua periodo de la Esperanto-movado, kun pensigaj demandoj ĉe la fino. Aperas intervjuo kun la sukcesa kaj fekunda hungara verkisto István *Nemere*, kiu estas esperantisto de dudek jaroj, kaj liaj libroj baldaŭ «inundos» la merkaton: estas presataj kaj aperos ĉijare kvin liaj libroj – kvar romanoj kaj unu novelaro. Kiel la post-intervjua novelo montras, Nemere estas majstro de la historioteksado, ŝatas aventurojn, kaj tio kvazaŭ garantias, ke baldaŭ li fariĝos unu el la plej legataj esperantistaj verkistoj.

Artamantoj povas ekkoni la tre originalajn pentraĵojn de la nederlanda pentristo Hugo *Landheer*: la aĝa majstro donacis plurajn siajn verkojn al la hungara Esperanto-movado.

«Magia-kubo» aŭ «Rubik-kubo» furoras en la mondo, kaj ĝi jam havas signifan literaturon. Nun ankaŭ nia revuo kontribuas al tiu literaturo per artikolo pri la «turn-arto» – espereble, je la plezuro de multaj legantoj.

Sed la ĉefan plezuron por la legantoj de HV – plejparte loĝantaj en landoj proksimaj de Hungario – signifas la novaĵo pri UK. Ni esperas saluti multajn el Vi en Budapeŝto, do, ek, aliĝu tuj!

1983: Universala Kongreso en Budapeŝto

Estus malfacile denombri, kio estas Universala Kongreso por esperantistoj: semajno da Esperantuja etoso, eblo renkonti korespondantojn, ĝui altnivelajn Esperantajn kulturprogramojn, direkti la atenton de la nin ĉirkaŭanta socio al ni, kaj vaste propagandi la Internacian Lingvon, kaj – proprakokule sperti, ke ni estas multaj. La listo ne estas kompleta, ja la tradiciaj varieco kaj riĉa programaro de la universalaj kongresoj ofertas milon da aspektoj, el kiuj ĉiuj povas elekti laŭ sia(j)n.

Budapeŝto ĝis nun dufoje gastigis Universalan Kongreson, en 1929 kaj 1966, kaj venontjare *ĉi tie okazos la 68a Universala Kongreso de Esperanto.* Inter la unua kaj dua Budapeŝta UK pasis 37 jaroj, inter la dua kaj tria nur 17 jaroj. Se tiu tendenco daŭros, jam eble post jardeko sekvos la kvara...

Sed nun temas pri la tria Budapeŝta UK, kiu antaŭvideble altiros rekordan nombron da partoprenantoj. Tamen, Loka Kongresa Komitato – kiu jam vigle laboras por la sukceso de la 68a – celas ne nepre kvantan, sed kvalitan rekordon. Jam certas, ke konvene al la tradicioj de la hungara Esperanto-movado la tria Budapeŝta UK aparte riĉos je kulturaj aranĝoj: krom la tradiciaj kulturaj eroj enprogramiĝos vico da teatraj vesperoj (verŝajne fakultativaj), kunvenoj de kulturaj agantoj (redaktoroj, eldonistoj ktp.) kaj diversaj oportunaj okazoj por ekkoni la hungaran kulturon.

Jam certas, ke en Hungario okazos ankaŭ la 39-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi okazos en la urbo Debrecen, kiu situas en la orienta parto de Hungario. La prezidanto de LKK estos Imre Szabó, estrarano de HEA.

Budapeŝto kaj Debrecen atendas Vin!



Pro la grandeco de la laboro LKK de la 68a UK estos relative grandnombra. Ĝian „kernon" formos la sekvaj personoj: d-ro Endre *Baráth,* parlamentano, sekretario de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento, ĝenerala sekretario de HEA, (prezidanto de LKK), Márton *Lengyel,* vic-gvidanto de Hungara Turisma Oficejo, prezidanto de Budapeŝta Komitato de HEA (vicprezidanto de LKK), d-ro Imre *Pethes,* vicprezidanto de HEA (vicprezidanto de LKK), Tibor *Vaskó,* sekretario de HEA (ĝenerala sekretario de LKK), Elizabeta *Pallós,* estrarano de HEA (sekretario de LKK pri organizaj kaj administraj aferoj), d-ro Vilmos *Benczik,* estrarano de HEA (sekretario de LKK pri kulturaj kaj gazetaraj aferoj). La kasisto de LKK estos István *Mészáros.* Rektoro de la Internacia Kongresa Universitato fariĝos d-ro Ottó *Haszpra,* universitata profesoro, doktoro de teknikaj sciencoj, estrarano de HEA; gvidanto de la Esperantologia Konferenco estos d-ro István *Szerdahelyi.*

La hungara esperantistaro sentas sin feliĉa povante aranĝi Universalan Kongreson, kaj faros ĉion eblan por agrabligi la restadon de la kongresanaro en nia lando. Ankaŭ nia revuo deziras plej efike agadi por tiu celo. Ni kredas, ke ni povos kontribui al la agrabla Hungarlanda kongresado per *daŭra liverado de informoj* pri diversaj aspektoj de la *hungara vivo,* ja oni povas vere bone farti nur en lando, pri kiu oni havas almenaŭ bazajn informojn. Ni jam estas laborantaj pri jara redakcia programo porkongresa, tamen, volontege ni akceptos pliajn sugestojn: ni petas ĉiujn niajn legantojn kaj estontajn kongresanojn skribi al ni, pri kiuj hungaraj temoj ili preferus legi en la sekvaj numeroj?

La hungara esperantistaro kaj la tuta hungara popolo elkore invitas ĉiujn esperantistojn veni venontjare al Budapeŝto. Tiuj, kiuj akceptos la inviton, havos la okazon konatiĝi kun unu el la tradiciaj kulturaj centroj Esperantaj, kaj kun lando, kiun loĝas popolo vivanta en dinamisma socia harmonio.

KONGRESO ĈE BALATONO

34a KONGRESO de IFEF Balatonfüred

2a - 8a de Majo

„La reloj kunligas la landojn, Esperanto la popolojn" – diras la slogano de esperantistaj fervojistoj. Tiu bela penso impone realiĝis en la hungara urbo *Balatonfüred* inter la 2a kaj 8a de majo, dum la 34a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Kunvenis 605 partoprenantoj el 22 landoj, kaj ili povis ĝui vere bone organizitan kongreson, en agrabla medio, kun riĉa programo.

La inaŭguron partoprenis elstaraj reprezentantoj de esperantistaj kaj neesperantistaj instancoj, interalie Sándor *Urbán,* anstataŭanto de la Ĝenerala Direktoro de Hungara Ŝtatfervojoj, Béla *Szemők,* sekretario de la Sindikato de Hungaraj Fervojistoj, István *Rácz,* urbestro de Balatonfüred, d-ro Erwin *Semmelrath,* reprezentanto de Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj (FISAIC), d-rino Flóra *Szabó-Felső,* ĝenerala sekretario de UEA. Estas menciinde, ke Joachim *Giessner,* prezidanto de IFEF en sia malferma parolo citis la vortojn de János *Kádár,* unua sekretario de Hungara Socialisma Laborista Partio: *„La agantoj kaj disvastigantoj de Esperanto servas noblan celon, ĉar ili kunligas la mult-centmilan amason de la diversnaciaj homoj, kaj helpas la ĉesigon de la izoliteco inter la popoloj, la interkompreniĝon de la popoloj, la profundiĝon de amikeco kaj solidareco..."* Estis bela momento de la inaŭguro, kiam Erwin Semmelrath transdonis la oran medalon de FISAIC al d-ro István *Bácskai,* multmerita gvidanto de hungara fervojista E-movado.

El la kongresa faka laboro meritas apartan mencion la kunsidoj de la Terminara Komisiono. Eble neniu alia fako tiel sisteme kaj profunde okupiĝas pri la perfektigo kaj aktualigo de sia faka lingvo, kiel faras la fervojistoj.

La 34-a IFEF-Kongreso havis aparte riĉan kulturan programon. En „Balaton Galerio" okazis ekspozicio pri la fervojfaka utiligo de Esperanto. D-ro Ferenc *Jáki* prelegis pri literaturo kaj pri la kulturhistoriaj specialaĵoj de la urbo Balatonfüred. Krom li, prelegis dum la Kongreso d-ro Ottó *Haszpra,* Bernard *Golden* kaj István *Gulyás.*



La 6-an de majo vespere okazis interesa kulturprogramo, redaktita de s-ino Éva *Farkas-Tatár.* Muzikamantojn ĝojigis la Simfonia Orkestro de Hungaraj Ŝtatfervojoj, prezentante verkojn de *Erkel, Liszt, Kodály* kaj *Berlioz.* Belajn poemojn kaj novelojn prezentis al la publiko la elstaraj geaktoroj Kati *Berek* kaj József *Kovács P.* La literaturajn programerojn sekvis folkloraj kantoj kaj dancoj, kies vigla ritmo tute forpelis la dormemon el la okuloj de la publiko, malgraŭ la tre malfrua horo.

Dum tiu ĉi Kongreso IFEF elektis novan estraron. Prezidanto fariĝis Joachim *Giessner,* vicprezidanto Per *Engen,* sekretario Otto *Rösemann,* kasisto Henning *Hauge,* redaktoro Henning *Olsen.* Oni decidis ankaŭ pri la loko de la sekvaj IFEF-kongresoj. Fervojistaj esperantistoj kongresos venontjare en Belgio, en 1984 en Bulgario, la 37-an Kongreson en 1985 aranĝos kune Svedio, Norvegio, Finnlando kaj Danio, en 1985 sekvos Jugoslavio, en 1987 Francio kaj en 1988 Hispanio.

La 34-a IFEF-Kongreso estis sukcesa Esperanto-aranĝo. La sukceso ŝuldiĝas ĉefe al la LKK (prezidanto: István *Gulyás,* sekretario: János *Patay*), kaj al dekoj dahelpantoj, kiuj senlace kaj sinofere faris ĉion, por ke ĉiuj gastoj fartu en Balatonfüred kiel eble plej bone.

La kongresa plenkunsido akceptis la suban rezolucion:

La 34a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazinta en Balatonfüred (Hungario) kun 605 partoprenantoj el 22 landoj

konstatas, *ke grave akriĝas la lingvaj komplikaĵoj en ĉiaspecaj internaciaj institucioj, kunvenoj kaj konferencoj, ĉefe pro daŭra aldono de novaj konferenclingvoj;*

substrekas, *ke bedaŭrinde ankaŭ la fervojaj entreprenoj, fervojistaj sindikatoj kaj aliaj fervojistaj organizoj same agas, aplikante privilegiitajn lingvojn de potencaj ŝtatoj, tiel subpremante ĉiujn aliajn lingvojn kaj neglektante evidentajn malavantaĝojn, kiel ekzemple superfluajn kostojn, tempoperdojn, tradukerarojn, miskomprenojn;*

emfazas, *ke tiuj kutimoj endanĝerigas la pacan kunvivadon de la popoloj, malhelpas ties komprenon unuj por la aliaj kaj kontraŭas la Finakton de Helsinki;*

atentigas, *ke la Ĝenerala Asemblo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 „Internacia Jaro de Komunikado" kaj sekve*

invitas *la fervojojn kaj fervojistajn sindikatojn, sed precipe la Internacian Federacion de Kulturflegantaj Fervojistoj (FISAIC), utiligi al si la eminentajn ekonomiajn kaj sociajn avantaĝojn de la neŭtrala kaj bone funkcianta internacia lingvo Esperanto ĉiel aplikebla;*

deklaras, *ke la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio pretas ĉiu-rilate helpi, por ke la proponitaj celoj kiel eble plej rapide kaj komplete estu atingitaj.*

Balatonfüred, la 7an de majo 1982.

Zoltán Kodály -komponisto de sintezo



En tiu ĉi jaro oni rememoras en la muzika mondo pri la vivoverko de Zoltán *Kodály* (Ko! da:j), kies muziko transarkas la klasikulojn de la antaŭa jarcento, ĝis la praa hungara popolkanto kaj samtempe ĝis la revolucie nova muzika stilo de la aktuala epoko.

Zoltán Kodály naskiĝis en 1882 en la urbeto Kecskemét. Ĉar lia patro estis fervojista oficisto, la familio devis ofte ŝanĝi la loĝlokon. Ambaŭ liaj gepatroj estis muzikemaj, sekve Kodály kiel infano frue renkontis kamermuzikon de la klasikuloj en la gepatra domo. Li pasigis la plej belajn infanjarojn en la vilaĝo Galánta. Laŭ lia konfeso, li pli frue kantis, ol parolis kaj preferis la kantadon al la parolado. Frue li konatiĝis kun la instrumentoj kaj kun la klasikaj majstroverkoj.

Ankoraŭ dum la jaroj en Galánta li komencis ludi fortepianon, poste kiel gimnazia studento li ellernis ankaŭ la violon- kaj violonĉelo-ludon. Rapide li evoluigis siajn muzikajn kapablojn kaj baldaŭ li komencis komponi. La debuto sukcesis bonege kaj per tio li ricevis instigon por pluaj kompoⁿaĵoj.

Intertempe li ne malzorgis siajn lernejajn studojn. En 1900 li abiturientiĝis kaj post tio alvenis al la unua turnopunkto: decidi pri sia plua vivovojo. Lia koro lin tiris al la muziko, sed la gepatroj deziris, ke li fariĝu juristo. Fine li decidis studi komponadon en Budapeŝta Muzikakademio, samtempe vizitante ankaŭ prelegojn en la filologia fakultato de la Scienca Universitato. Al tiu kompromiso lin instigis la profesikonscio kaj la obeemo al la gepatroj. Li antaŭsentis, ke por la grandaj taskoj, kiujn li celis atingi, li bezonos multflankan erudicion.

La artifikojn de la komponado li ellernis de J. Koessler, elstara profesoro de la Muzikakademio. Li ĉiam finis la semestrojn kun eminenta rezulto. Lia majstro estis kontenta pri lia progreso, sed nur dum li vidis la efikon de la granduloj (Haydn, Brahms, Schubert) en la komponaĵoj de la juna studento. Sed kiam Kodály ĉiam pli konscie turnis sin al la hungaraj muzikaj elementoj, la majstro riproĉis lin pro tio. Laŭ lia opinio „la hungara karaktero en la pli altnivela muziko povas esti nur ie-tie aplikita kolormakulo." De tiam la vojoj de la profesoro kaj la disĉiplo ĉiam pli disiĝis.

Tiutempe akceptis Kodály kiel kamaradon la grandan samtempulon Béla Bartók. Ili ambaŭ celis ŝanĝi la mondon ĉirkaŭ si kaj fari la hungaran muzikon pli bela, pli bona, pli vera kaj pli hungara. La batalon ili komencis kune, kaj tiel batalis daŭre, helpante reciproke unu la alian.

En 1905 Kodály finis siajn studojn en la Muzikakademio, ricevis la profesoran diplomon kaj verkis elstaran komponaĵon *Adagio* por violono kaj fortepiano. Ankoraŭ en la sama jaro li komencis provincajn vojaĝojn, por kolekti popolkantojn. Intertempe li faris pluajn vojaĝojn ankaŭ en Okcident-Eŭropaj landoj, por perfektigi sian scion. Kiel 25-jara junulo li fariĝis profesoro de la Muzikakademio.

La aĝa majstro kun junpioniroj

La unuaj komponaĵoj de Kodály estis kamermuzikaj verkoj. La melodi--materio kaj harmoni-trezoro de tiuj verkoj estis tute novaj, nekutimaj kaj pro tio multaj el la fakuloj kontraŭis liajn verkaĵojn. Tamen troviĝis kelkaj el la kompetentuloj, kiuj kvazaŭ vizie rimarkis kaj antaŭvidis, ke „la nomo de Kodály de nun fariĝos unu el la plej belaj hungaraj nomoj..." Iom post iom ankaŭ la eksterlanda publiko ekkonis la muzikon de Kodály.

Intertempe ĉiam pli profundiĝis lia amikeco kun Béla Bartók, kun kiu li ofte kunlaboris, precipe sur la tereno de la popolkant-kolektado kaj popularigo de la moderna muzika arto.

Dum la tempo de la Hungara Konsilia Respubliko (1919) oni nomis profesoron Kodály vicdirektoro de la reorganizita Hungara Muzikarta Altlernejo. Li planis efike helpi la direktoron realigi la bezonatajn reformojn, sed la tempo por tio estis mallonga. Post la faligo de la Konsilia Respubliko Kodály provizore perdis tiun postenon: nur post du jaroj li rajtis daŭrigi sian laboron.

La postmilitan jardekon ni povas rigardi, kiel epokon de la unuaj gravaj triumfoj. En tiu epoko naskiĝis la famiĝinta *Psalmus Hungaricus* (Hungara Psalmo), la teatraj verkoj kaj pluraj ĥorverkoj por infankoruso. En 1923 oni prezentis la grandiozan verkon *Psalmus,* en 1926 la teatraĵon *Háry János* (Johano Háry), en 1932 la alian teatraĵon *Székelyfonó* (Sikula ŝpinejo).

La prezento de *Háry János* en la Operejo (1926) estis solena okazaĵo de la hungara teatra muziko, samtempe ĝi estis la plena brilo de la praa hungara popolkanto. Laŭ Kodály Háry estas la viviĝinta hungara fabelkreinta fantazio, esprimanto de la eterna hungara optimismo. Ĉar la temo de la teatraĵo estas fabelo, en kiu emerita infanteriano, ŝajniginta sin husaro, mensogadante rakontas pri siaj „heroaj" faroj: la teatraĵo dividiĝas je kvar „aventuroj", antaŭ- kaj postludoj. Laŭ la atesto de Kodály ĉiuj kantoj de la verko devenas el la popoltradicio.

La alia teatraĵo *Székelyfonó* estas unuakta drama rapsodio, kies teksto ankaŭ kompilis mem Kodály. La enhavo de la unuaktaĵo estas bukedo da popolkantoj kaj popolbaladoj. La hungarlanda prezento de la teatraĵo okazis en 1932.

Gratuloj post prezentado okaze de lia 80a naskiĝtago

En tiu epoko verkis Kodály la simfoniajn verkojn *Nyári este* (Somera vespero) kaj *Marosszéki táncok* (Dancoj de Marosszék). En la populara verkaĵo *Galántai táncok* (Dancoj de Galánta) li rememoras pri siaj infanjaroj, pasigitaj en la menciita vilaĝo.

Simile al la unua oratoria verkaĵo (Psalmus), en 1936 okazis la prezento de nova orkestra ĥor-verko de Kodály: *Budavári Te Deum* (Te Deum de Budavár). La verkon Kodály komponis pro la peto de la ĉefurbo, okaze de la 250a datreveno pri la liberigo de Buda de sub la turka subpremo.

La popularan komponaĵon *Felszállott a páva* (Ekflugis la pavo), verkitan en 1939, oni prezentis unuafoje en Amsterdamo, sub la direktado de Mengelberg. Ĉi tiu prezento rikoltis veran internacian sukceson. En Usono okazis la prezento de *Concerto,* kiun Kodály verkis por la Simfonia Orkestro de Chicago (1941).

Krom la kamermuzikaj, orkestraj verkoj Kodály kun speciala ambicio verkadis ĥor-verkojn, egale por infana, vira aŭ miksaj ĥoroj. Por multaj el tiuj oni kreis ankaŭ germanan, anglan, francan tekstojn, do ili fariĝis kanteblaj ankaŭ por eksterlandaj korusoj.

En 1962 Ferenc *Fricsay* en Lucerno prezentis la lastan orkestran komponaĵon de Kodály, la *Simfonion C-maĵoran.*

La muzikon de Kodály karakterizas la tendenco al granda sintezo. Lia arto ĉerpas inspiron parte el la verkoj de la grandaj klasikuloj, aliparte el la historiaj kantoj de la deksesa jarcento kaj el la praaj hungaraj popolkantoj. La granda merito de Kodály kuŝas en tio, ke li sukcesis unuigi tiujn diversajn elementojn, la plej bonajn tradiciojn de pluraj jarcentoj. Li kapablis krei la grandan sintezon de praa melodio – nova harmonio, popolmuziko – artmuziko, eŭropeco – hungareco. La lumo de lia klasika, humanisma arto trabrilas ĉian malhelon, ĉar ĝia fonto estas la fido al la homaro kaj pri la futuro de sia propra popolo.

István *László*

Julius Balbin

Vizaĝoj

Apenaŭ kvindekjara kaj febla
li aspektis kvazaŭ maljunulo
bezonanta lambastonojn:
kripligita per konfuzo
pri kio kaŭzis la koleron
de la Obersturmführer
kies vizaĝo estis senmova
kvazaŭ de manekeno.

La germano frapis
lian vakuan vizaĝon
repete
ĝis la karno ŝiriĝis
kaj la sango verŝiĝis
preskaŭ mirakle
el la nazo, la buŝo kaj la haŭto
kiuj ŝajnis tiel senvivaj.

Estis mirige
ke tiel ruĝa sango
venis el tiom pala vizaĝo.

La vizaĝo de la Obersturmführer
restis sobra kiel ŝtalo:
neniu kolero, malamo, amo aŭ kompato
markis liajn movojn
kiam la kalkanumo de lia boto
platigis la kranion de la maljunulo
en la grundon
varmigitan
per
la
sango.



Eldonejo *Műszaki* ofertas al la estimataj legantoj kaj fakuloj la subajn librojn en la hungara lingvo, necesajn por studado, ampleksigo de la konoj, kaj por la ĉiutaga laboro:

Barnabás Bárczy: Diferencialaj kalkuloj
28,- Ft

Barnabás Bárczy: Integralaj kalkuloj
36,- Ft

I.N. Bronstein — K.A. Semendjaev: Matematika poŝlibro
90,- Ft

d-ro László Zsombory: Lernolibro de la Trafika Kodo (KRESZ)
30,- Ft

Ervin Keller — Alajos Kalivoda — László Menczer: Ekzercoj por la ellerno de trafikreguloj
48,- Ft

Ervin Kovács: La tornisto
(Industria Faklibraro) 45,- Ft

László Kovács: Poŝlibro de teknikistoj
89,- Ft

Vilmos Milley — István Völgyes: Centra hejtado I-II.
(Industria Faklibraro) 62,- Ft

Gyula Obádovics J.: Matematiko
80,- Ft

Károly Opitzer (ĉefred.): Muntado de duktoj akva, kanalizacia kaj gasa I-II.
(Industria Faklibraro) 94,- Ft

György Rábel: Poŝlibro de maŝinfakaj teknologiistoj
91,- Ft

Zoltán Ternai: Lernolibro pri aŭtomobila tekniko

La Eldonejo *Műszaki konvene al la pretendoj de la legantoj daŭre reeldonas la suprajn librojn.*
Ili konstante estas aĉeteblaj:
en Budapeŝto en la vendejoj de Ŝtata Librokomerca Entrepreno, en provinco en la vendejoj de la Librokomerca Entrepreno Klera Popolo kaj en tiuj de Kooperativa Librokomerca Entrepreno.
Mendojn oni sendu al:

Eldonejo *Műszaki*
Budapest I. 1014
Szentháromság tér 1.

ELDONEJO MŰSZAKI

REFOJE PRI TEATRO

Aktoroj ne plu nur hungaraj

Ferii printempe signifas priŝteli sin je skiado aŭ je tagoj sunumaj. Nun kiam fermiĝis kurteno en Teatro „Miklós Radnóti", ni kiuj ekprintempis Budapeŝte povas konvinkitaj diri ke la „priŝtelo" valoris, riĉigante.

Ekzistas eble pluraj altkvalitaj kulturaj lokoj kiuj kapablus ravi kiel Budapeŝto. Sed la ĉefurbo de Hungario sciis plaĉi al la internacia Esperanto-publiko laŭ plej alloga maniero: riĉa programo de Printempa Festivalo ne hezitis doni spacon al Esperanto. Tiu fakto ke la festivalo kuraĝis peri sian riĉon ankaŭ per Esperanto, donas al ĝi, el la vidpunkto de esperantaj gastoj la plej multan nombron de poentoj kiujn el la ĉarmo de Budapeŝto plu ne eblas forkalkuli. Budapeŝto ne avaris je mono kaj laboro por ĉiuvespere sentigi siajn gastojn hejme sub la tegmento de la Teatro „Miklós Radnóti", kie de vespero al vespero kaskadis Esperanto en sia plej kvalita vesto.

Kun festivalo dorsposte oni senflate konfesu ke dum la pasintaj tagoj diversgrade plezurigis nin plurlandaj ensembloj sed ke la pinton de la festivalo prezentis ĝuste tiuj programeroj en kiuj hungaroj prezentis al ni siajn teatrajn valorojn. Du prezentaĵoj luditaj de hungaraj aktoroj montris al ni ambaŭ simbolajn maskojn de la teatra arto: la ridantan kaj la tristmienan.

La hungardevena teksto „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' profeto" *de János* Elem *trafis esperantistojn interalie pro surscenigo de vojaĝsituacio, kiu eĉ sub absurda formo restas al esperantistoj tre korproksima. Ĉu tial la rolo de turistgvidanto Idel tiom forte engravuriĝis, ĉar li karikaturas niajn ĉiamajn spertojn de unudirekta kompreno je kiu esperantistoj estas tiom sentemaj?*

„La aŭroroj tie estas silentaj" *de B. Vasilev, fariĝinte elstara sukceso de hungara teatro en miriga unuiĝo kun surscenigo de István Iglódi, ricevis per sia Esperanta versio apartan, universalan karakteron. La animskua teksto de Vasilev trovis en la prezentinta teamo brilajn interpretantojn. La prezentaĵo en kiu ne ekzistis flankrolo kalkuliĝas inter kulminoj de teatraj travivaĵoj en la vivo de teatraj spektantoj.*

La surscenejа reto en kiu baraktiĝis sortoj de militpartoprenantoj kaptis ankaŭ spektantojn: danka aplaŭdo, kiom ajn longa ĝi estas, daŭras nur tempeton. Sed geaktoroj konsciu ke per tiu prezentaĵo en Esperanto ili ĉesas esti nur hungaraj aktoroj. El tiu vidpunkto Printempa Festivalo ne riĉigis nur Budapeŝton, sed ankaŭ la mondon.

Dankon al Zoltán, Gabi, Virág, Eszter, Ildikó, Zsuzsa (Szilágyi kaj Liska), Mária kaj Athina *kies nomojn mi literume kopiis el la programfolio, sed kies voĉojn kaj vizaĝojn ni forportas al niaj hejmoj kiel la plej karan Budapeŝtan memoraĵon.*

Spomenka Štimec
(Jugoslavio)

Miraklo pripensiga

El fasko de belaj memorfloroj pri Budapeŝta Printempa Festivalo '82 mi plukas du por dankprezento: *In memoriam Kálmán Kalocsay* kaj *Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto* ? de János *Elem.*

Samkiel Hungario geografie estas la koro de Eŭropo, tiel Budapeŝto delonge estas la koro de l' poezio en Esperanto. Ne sen vibroj tial oni ĉeestis la honorigan solenaĵon al unu tutmonde konata bardo okaze de lia 90-jareco. Eĉ muzikon por kelkaj siaj prezentitaj verkoj li faris, kaj sub altgusta aranĝo de la redaktoro de la programo prezentiĝis abunda mozaiko de kanto sola kaj duopa, deklamo, voĉlego kaj muziko pere de profesiaj hungaraj artistoj, inter kiuj elstaris „dommastrino" de la vespero, aktorino Lilla *Mikes.*

En la Teatro „Miklós Radnóti" kaperis la *Profeto.* Sciante, ke kritikistoj surprizas aktorojn kaj eĉ aŭtorojn per geniaj scenanalizoj, mi nur aludu, ke temas pri vigla bildaro pri pseŭdoturismo ĝis plej absurdaj ekstremoj. Verdire sufiĉas por la kritikisto referi la turisman etoson en la antaŭhalo! Tie jam komencis *sian* version de la spektaklo tre preta, internacia publiko, kies unikaĵo estis verva interbabilado en unu sama neŭtrala lingvo. Nebrideble tie zum-zum-zumadis Esperanto, kaj pluen ondis tiu dolĉsona fluo tra la tuta teatro, tiel ke nur pene la (hungaraj) aktoroj povis akapari la (pa)rolojn. Antaŭvide laŭtega „rock"-kanta uverturo malebligis al senpagbiletuloj ekfajfi!

Por spektanto (malfeliĉe) sur la unua vico necesis tuja mobilizo de ĉiuj 5 sensoj: orel-gaso fluis el inĝeniaj aparatoj, polvo-nuboj penetris nazen, interdenten, gorĝen, kaj belegaj preskaŭ-nudulinoj okulvitren. Finfine tute aperta amorado certe ne restis sen efiko al la sentimentoj. Tiaspeca dramo pli ol iam pravigas, ke la metio aktora konsistas ĉefe en la arto igi la publikon *ne tusi.*

Polvo-nuboj, kial? Ĉar ni – t.e. ankaŭ la frontparto de l' publiko troviĝas en „sablo"-dezerto, en kiu saltas, fosas, dancas, dormas pli-malpli amputite amoras kaj ĉiel ĝisŝvite persistas turista grupo perfide lasita de sia gvidanto. Tiu lasta cetere praktikas mirigan maŝinproduktitan unuvojan abrakadabra-idiomon: *lante-hante-elefante!*

La streĉa situacio produktas strangan *turistdemokraturon,* sub kiu floras kuriozaj aktivecoj. Ne forgeseblas la soleca ŝakentuziasmulo, al kiu senkonsole mankas nur la fama hungara ŝakaŭtomato!

Multajn detal-triumfojn demonstras la reĝisorado de László *Romhányi.* Li almenaŭ konceptis, ke dramaturgio plenigas teatron, ideologio male.

Fine de la spektaklo mi sentis min – por uzi la vortojn de János *Elem* – unu el tiuj, kiuj hazarde-provizore hejmis sur la longitudo de Budapeŝto dum la mirinda Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, kie Profeto ĥimere ascendis ĉielen, forskuante la polvon, do sen piedsignoj malaperis ĉielarken, dum tondris aplaŭdoj kaj fulmis projekciiloj. Miraklo pripensinda.

Poul *Thorsen*
(Danio)

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

3. La iniciatoro kaj la iniciato

Kreinto de lingvoplano, taŭga por fariĝi definitive la Internacia Lingvo, estis la varsovia okulkuracisto L. Zamenhof, kiu devenis el la plurlingva medio de la okcidenta parto de la Rusa Imperio.

Zamenhof kaj la lingvoj

Li naskiĝis en Bjalistoko 1859-12-15, kaj mortis en Varsovio 1917-04-14. Naskiĝe li ricevis la jidan nomon *Lejzer*. La *jida* estis la unua lingvo de la infano, kiun li lernis de la patrino, en la elementa lernejo kaj de la judaj kvartaloj de Bjalistoko – urbo, kie du trionoj de la loĝantaro estis jide parolanta judo. Pli poste, loĝante kaj praktikante en la mezo de la juda kvartalo de Varsovio, li parolis la jidan speciale kun siaj pacientoj, kiuj ofte alian lingvon ne parolis.

Sed lia patro malgraŭ sia judeco akiris la postenon de ŝtata instruisto. Por certigi al si sekuran situacion kaj doni la plej bonan edukadon al siaj infanoj, en sia hejmo li trudis la uzadon de la sola oficiala lingvo, la *rusa*. Lia filo Lejzer fariĝis *Lazar* kaj studis en la ruslingvaj gimnazioj kaj universitatoj de Bjalistoko, Varsovio kaj Moskvo. Sekve la rusan li konsideris «gepatra lingvo, «kiun li plej multe amis», verkis, eĉ versis en ĝi.

Li lernis la *polan* jam en Bjalistoko, kun poloj li ĉiam parolis pole. Li vivis plejparte en Varsovio, kie en la 1890-aj jaroj anstataŭ la oficiala Lazar li ekuzis la polan nomon Ludwik. Tamen, eĉ liaj filoj, maturiĝintaj, uzis inter si la rusan, kaj nur la sekvanta generacio poliĝis definitive.

Almenaŭ tiel flue li parolis ankaŭ la *germanan*, en kiu lia nomo estas *Ludwig*. Li lernis ĝin jam de la gepatroj, poste en lernejoj, kaj verkis en ĝi tiel perfekte, kiel en la rusa. En la lernejoj li ellernis ankaŭ la francan, la hebrean kaj la latinan, sed li tute ne faris lingvistikajn studojn.

La ruslingva kuracista diplomo de Zamenhof datiĝas en Varsovio 1885-05-28. Post iom da praktikado li specialistiĝis en en Vieno en 1886. Fariĝinte okulisto li tre konscience, ame kaj bone praktikadis. Tamen, pro


Dᴿᵒ ESPERANTO

INTERNACIA

LINGVO

ANTAŬPAROLO

KAJ

PLENA LERNOLIBRO

por Rusoj

Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.

Prezo 15 kopekoj.

VARSOVIO.

Tipo-Litografejo de Ch. Kelter, str. Novolipje № 11.

1887.

Dᴿᵒ ESPERANTO.

DUA LIBRO

de l' lingvo

INTERNACIA

KAJERO № 1.

Kosto 25 kopekoj.

VARSOVIO.

1888.

la malriĉeco de la klientoj kaj pro la ne malofta senpaga kuracado li vivis ĉiam kun financaj zorgoj, precipe premaj dum la unuaj dek jaroj de sia praktikado.

La ĝenerala politiko de la despotisma rusa ŝtato enhavis la subpremon de la nerusaj nacioj, instigadon de malamikeco kontraŭ kaj inter ili. Okcidente regis etoso de kontraŭpola ŝovinisma incitado kaj antisemitaj pogromoj. La plej subpremataj estis la judoj.

Dum siaj studentaj jaroj Zamenhof aliĝis kaj aktive partoprenis la starigantan cionisman movadon. Sed post nelonge li komprenis, ke cionismo estas nur speciala formo de ŝovinismo, kaj ke ne izoliĝo alportos liberecon por la judoj. Do, li rifuzis la cionismon, sed same li rifuzis ankaŭ la konsekvencan asimiliĝon, la konscian perdon de la propra nacieco.

Li venis al tiu falsa konkludo, ke esence la lingvaj problemoj mem kaŭzas la malamikecon inter la nacioj, la nacian subpremon, eĉ la militojn. Obsedite de tiu penso, *deziregante eternan pacon kaj harmonion inter la nacioj, li prilaboris la saman teorion de la Internacia Lingvo, kiun samtempe Komenský*. Krome li aperigis ankaŭ la *lingvoplanon de la Internacia Lingvo,* kiu en la praktiko alte superis ĉiujn antaŭajn kaj postajn provojn, inkluzive Volapukon.

La unua – Dua...

Dum dekdu jaroj (1874-1886) Zamenhof ellaboris sian aposterioran lingvoplanon por la Internacia Lingvo. Dume, kiam la plej granda parto de lia laboro jam estis finita, aperis en Rusio Volapuko. Li ekstudis, eĉ ellernis ĝin, sed spertante ĝiajn mankojn li reiris al sia laboro kaj finis ĝin.

La unuaj *lernolibroj aperis en Varsovio ruse, pole, germane kaj france.* La titoloj sinsekve estis (kun aperdato laŭ la gregoriana kalendaro): *Meĭdunarodnij jazik* (1887-07-26); *Jezyk miedzynarodowy* (1887-09-06); *Internationale Sprache* kaj *Langue internationale* (ambaŭ 1887-11-24). La aldono de tiuj 40-paĝaj libretoj estis vortaro (kun 917 elementoj) sur foliego. Tiujn kvar lernolibrojn kune oni nomas tradicie «La Unua Libro».

Tamen, *la unua libro en la Internacia Lingvo havas la titolon: Dua libro de l'Lingvo Internacia: kajero no. 1.* Sed anstataŭ pluaj kajeroj sekvis ĝin la verko *Aldono al la «Dua libro de l' Lingvo Internacia»*, kiu fakte estas la dua libro en Esperanto. Ili ambaŭ aperis en Varsovio, en 1888.

Dum la unuaj jaroj Zamenhof uzis la pseŭdonimon *Dr. Esperanto* aŭ *D-ro Esperanto.* Sed la unuaj adeptoj baldaŭ ekuzis la pseŭdonimon de la aŭtoro por nomi la lingvon mem. Komence oni diris «la lingvo de Esperanto», poste «la lingvo Esperanto» («die Esperanto-Sprache», ktp), pli malfrue «lingvo Esperanta» aŭ simple «Esperanto». Sed obstine restis ankaŭ la originala «lingvo internacia», pli malfrue fariĝinta majuskla: *Lingvo Internacia.*

Lingvoŝanĝo de la internacilingva movado

La unuaj adeptoj de Zamenhof estis el la Rusa Imperio, kie Volapuko apenaŭ estis konata. Sed organizi ilin en la despotisma Rusio ne estis facile. La Ministerio por Internaj Aferoj en 1888 malpermesis al Zamenhof lanĉi sian planitan semajnan gazeton *La Internaciulo.* La situacio estis malesperiga.



Japanlingve oni eldonis ok-voluman biografion de Zamenhof, sur pluraj miloj da paĝoj

Tamen: «Li trovis aŭskultadon unue ĉe la publiko, kiu jam okupiĝis pri la ideo de la mondlingvo okaze de Volapük. Oni povus diri, ke same kiel kristanismo elkreskis el la greklingvaj sinagogoj, tiel Esperanto enplantiĝis en la volapükistajn rondojn kaj tie ekfloris.» (Waringhien, 1959).

Eminentaj volapukistoj ekaplikis Esperanton: unue en 1887 la pola Antoni Grabowski, poste en 1888 Leopold Einstein, la plej fervora propagandisto de la Volapuko en Germanio, poste aliaj. En 1888 du grupoj esperantiĝis: *Weltspracheverein in Nürnberg* (t.e. Nurenberga Mondolingvo-Asocio; fondita en 1885), kaj la Volapukista Grupo en Veliko Târnovo (Bulgario). Do, la unuaj du Esperanto-organizaĵoj estis eksvolapukistaj.

Eksvolapukisto ekeldonis en *Nurenbergo* la unuan – kaj longe la solan – Esperanto-gazeton. *La Esperantisto* aperis de 1889-09-01 ĝis majo-junio (fakte aŭgusto) 1895. Ĝuste tiuj jaroj estis katastrofaj por la volapukistoj: disfalis kaj malaperis preskaŭ ĉiuj volapukistaj societoj. La Esperanto-movado tamen restis tre malgranda: apenaŭ kelkcent esperantistoj uzis la lingvon en la 1890-aj jaroj.

Bernard Golden

La propono de la Amerika Filozofia Societo al la Hungara Scienca Akademio en 1888

La 24-an de aprilo 1888, la Hungara Scienca Akademio en Budapeŝto ricevis propcnon de la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio, Usono, okupiĝi pri la internacilingva demando. Jen mia esperantigo de la anglalingva teksto de la korespondaĵo:

Aŭlo de la Amerika Filozofia Societo
Filadelfio, la 12-an de marto 1888

Ĉe kunveno de la Societo, okazinta en Filadelfio la 6-an de januaro 1888, la sekva rezolucio estis adoptita:

Estis decidite, ke la Prezidanto de la Amerika Filozofia Societo estu petita adresi leteron al ĉiuj klerulaj organizaĵoj, kun kiuj tiu ĉi Societo havas oficialajn interrilatojn, kaj al tiaj aliaj societoj kaj individuoj, kiujn li opinias konvenaj, por peti ilian kunlaboron perfektigi lingvon por kleraj kaj komercaj celoj, bazitan sur la arja vortprovizo kaj gramatiko en iliaj plej simplaj formoj; kaj por proponi tiucele internacian Kongreson, kies unua kunveno estu aranĝita en Londono aŭ Parizo.

Konforme al tio, mi nun havas la honoron transdoni ĝin por via konsidero, kaj inviti vian kunlaboron por efektivigi la celon, al kiu ĝi rilatas. Por ke la vidpunktoj de nia Societo, kiuj kondukis al la adopto de la rezolucio, estu komprenitaj, mi akiris permeson sendi ĉi-kune ekzemplerojn de la Raportoj de la Speciala Komitato, al kiu la temo de plano por universala lingvo estis direktita fare de la Societo.

Vi konstatos, ke la rezolucio de la Societo ne konformas ĝislime kun tio konsilita de la komitato, sed la temo havas tiel vastan intereson, ke ĝi estas altgrade inda je la plej ampleksa ekzameno. Mi, do, petas por ĝi vian baldaŭan kaj favoran konsideron, kaj petas, ke via decido estu komunikita al mi, kaj, se favora, ĉu vi preferas la aranĝon de la konferenco en Londono aŭ Parizo, kaj ankaŭ indiku la nombron de la delegitoj, kiujn ĉiu societo sendu.

Post ricevo de decidoj de la diversaj organizaĵoj, kun kiuj ni korespondas, mi kunvokos la konferencon.

Tre respektplene via,
(subskribita) Fred. Fraley
Prezidanto

Tiu ĉi dokumento en la formo de presita cirkulero estis vaste dissendita tra la mondo. La menciita komitato de la Amerika Filozofia Societo estis nomumita en 1887 kaj konsistis el tri membroj de la Societo: Henry Phillips, filologo kaj numismato, David G. Brinton, etnologo kaj lingvisto, kaj Monroe Snyder. La tri kleruloj, kiuj ricevis la taskon esplori la demandon pri la kreo de internacia lingvo, komencis analizi jam publikigitajn lingvoprojektojn kaj taksis ilin en raportoj eldonitaj de la Amerika Filozofia Societo. La unua lingvo, kiu estis profunde ekzamenita, estis Volapuko, kiu ricevis plurflankan malfavoran kritikon de la komitatanoj.

En januaro 1888 la Societo ricevis ekzempleron de la franca traduko de la 'Unua Libro' de d-ro Esperanto, eldonita en novembro 1887. Tiu ĉi verko ricevis favoran traktadon, ĉar la komitatanoj rimarkis, ke d-ro Zamenhof donis al sia lingvo plurajn trajtojn, kiuj koincidis kun la planlingvaj principoj formulitaj de la usonaj lingvistoj sendepende de aliaj projektoj. Solvenda enigmo por historiistoj de la Esperanto-movado estas jena: kiel Zamenhof eksciis jam en 1887 pri la okupiĝo de la Amerika Filozofia Societo pri internaciaj lingvoj?

Zamenhof detale informiĝis ankaŭ pri la projektita kongreso, ĉar la 10-an de aprilo 1888 li skribis al Henry Phillips, dankante lin pro la raporto pri Volapuko kaj donante sian plenan konsenton al la Kongreso rilate la faradon de ŝanĝoj en Esperanto. La aŭtoro de Esperanto mencias la cirkuleron de Prezidanto Fraley en la 'Aldono' de la *Dua Libro de l' Lingvo Internacia.* Postaj eventoj montris, ke la meritplena entrepreno de la usona klerula organizaĵo estis antaŭtempa kaj iom tro optimisma. La dua suplementa raporto de la komitato, prezentita en decembro 1888 kaj eldonita en januaro de la sekva jaro, sciigis inter aliaj aferoj, ke pro manko de amasa subteno, la kongreso ne povas efektiviĝi. Zamenhof jam antaŭvidis tion pli frue en 1888 en la 'Aldono' de la *Dua Libro* kaj li klarigis en La Esperantisto en 1889, ke la fiaskinta kongresa kunvoko rezultis de la indiferenteco de instruituloj.

Unu el la klerulaj organizaĵoj, kiuj reagis negative al la propono de la Amerika Filozofia Societo, estis la Hungara Scienca Akademio. Ne estas sciate precize, kial la Akademio rifuzis kunlabori kun la Societo, ĉar neniu respondo troviĝas en la arkivo, kiu enhavas leterojn de pluraj aliaj organizaĵoj kaj ankaŭ individuoj rilate la temon. Povas esti, ke la propono estis ignorita tutsimple pro indiferenteco, kiel skribis Zamenhof.

Du jardekojn poste, en la jaro 1906, simila propono estis adresita al la Hungara Scienca Akademio fare de Louis Couturat, la prezidanto de la Delegacio por la Elekto de Internacia Lingvo. Li petis, ke la Akademio apogu la Delegacion dum la kongreso de la Internacia Asocio de Akademioj, okazonta la sekvan jaron. Tiutempe okupiĝis pri la internacilingva demando en la Akademio Ignác Goldziher, eminenta orientalisto. Lia starpunkto pri internaciaj lingvoj estis kontraŭa, kaj en referaĵo prezentita al la Akademio, li malakceptis la proponon de Couturat kaj rekomendis, ke la Hungara Scienca Akademio ne agu korporacie en la kongreso. De 1876 ĝis 1892 Goldziher estis koresponda membro de la Akademio, do estas eble, ke ankaŭ tiutempe, kiam alvenis la cirkulero de la Amerika Filozofia Societo, li malfavore influis la prezidanton, kaj pro tio la Akademio ne reagis pozitive.

Povas esti providence, ke la kongreso de la Amerika Filozofia Societo ne okazis. La interesiĝo pri internacia lingvo ĉe tiamaj klerulaj organizaĵoj estis tro malvasta, kaj la tempo ankoraŭ ne estis matura por decidi pri tiel grava afero en kongreso. Plej verŝajne la tiutempaj delegitoj estus farintaj tiom da ŝanĝoj en Esperanto, ke ĝi apenaŭ estus povinta ĝisvivi. Se la esperantistoj ne havis okazon kandidatigi sian lingvon en tiu neokazinta kongreso de la 1880-aj jaroj, ili ne bedaŭru tion, ĉar ili ankoraŭ havas sian lingvon hodiaŭ.

JUBILEAS JELENKOR

Kvaronjarcenta literatura revuo province

En nia numero 82/1 aperis artikolo pri departemento Baranya. Tie – pro la limigita spaco – ni nur aludi povis pri la riĉa kultura kaj spirita vivo de la regiono.

La kuranta jaro estas la dudekkvina, ekde la apero de la altnivela literatura revuo *Jelenkor* (Nuntempo), kiun naskis la sama spirita medio, kiu ankaŭ ĝiajn antaŭulojn, la revuojn: *Sorsunk* (Nia Sorto) kaj *Dunántúl* (Transdanubio) – literaturistoj kaj literaturamantoj de urbo Pécs kaj ĝia regiono. *Jelenkor* estas provinca nur laŭ la geografia situo de ĝia redakcio kaj eldonejo, fakte ĝi staras jam de kvaronjarcento en la unua linio de nia beletro.

Ĉifoje ni prezentas kelkajn poeziajn pecojn de tri konstantaj kunlaborantoj de la revuo, al kiu ni deziras ankoraŭ longan futuron.

M. *Fejes*

László Bertók

Kiel paŝo en neĝo

Nur tiam licus verson verki,
se ne plu eblas verson verki,

hojlante, kiel diofrato
sopira al pli bona fato,

kurante, kiel best' kun vundo,
al kuglo rekte kontraŭ frunto,

falante, kiel hom' venkinta,
kiun absorbis venk' dubinda,

kiel ŝvelante la rivero
rigardus larmojn de l' ĉielo,

ter' kiel estus la ĉielo,
kaj ties morta lun' la tero,

kiel eterna ŝtoninundo,
torentus al la mond-profundo,

ne-elĉerpeble, -plenigeble,
tamen strebante ĉiam febre,

kaj eĉ tiam ne verson skribi,
nur sur papero blanke drivi

dum, kiel paŝ' en neĝa palo,
verso penetras tra l' realo.

Tradukis: Imre Szabó

László Galambosi

Rozolampoj
Al García Lorca

Nupton taŭro ne plu festos.
Ruĝa nubo ŝtelojn glutas.
Brufermiĝas oraj kradoj,
la ciganoj gitarludas.
Ekas šaŭmo, el balanco
de rozlampoj – la aŭroro.
Frapas frunton, pintajn kornojn
per spado la matadoro.
Fer-tinto en la areno.
Fer-bruo sur la kranio.
Treme skuas sin la kor' de
fer-kovrita Hispanio.
Son' funebra. Sur trumpetoj
flirtas floroj diantformaj,
ĉirkaŭ liut-kašaj rokoj
epoletoj la ĝendarmaj.
Sur rok-botoj roko-spronoj
kiun tretas kun teruro?
Lia harar' – plum' de korvo,
glacifloro en okulo.
Lia frunt' – rompita gemo.
Man' – konkava, el marmoro.
Veŝton loĝas papilioj.
Por li veas la sonoro.
Al poet' García Lorca
andaluzoj migri pretas.
Super ole-þranĉan tukon
ili ŝildan lunon metas.

Tradukis: M. F.

Győző Csorba

Mond' eĉ sen mi

Mond' eĉ sen mi status iel –
Kreskas frambo, frag' samtiel,
vivas rozo, kaj aŭrore
triloj, silent' tagmezhore,
iu eĉ sen mi ja estos,
kiu en la herb' siestos,
mirante, ke adas tranĉoj,
– kvaz' de tondil' – arbobranĉoj
senripoze sin balancas,
ĉielon kaj teron tranĉas.
Estos ĉio laŭ la ordo,
se min forvišos la Sorto.
Kiam faros mi transiron,
mi ne movos la pesilon:
pezas polver' ja neniom,
kial signus montril' ion?

Tradukis: M. F.

László Bertók

Unua adiaŭletero de Demosteno

Mi adiaŭas la vortojn, elkraĉas
la ŝtoneton levantan la langon,
kaverno de papilioj buntaj: ĉi buŝo
estu, kio estis, nure nur faringo,
ĉi lango, birdo nervoza
holokaŭstos neste, senide,
ĉi vortaroj, bobeloj koloraj
hejmenŝvebos inter la nubojn,
nur la okuloj tenas ilin, la okuloj
spegulas lumon per vizaĝo patrina,
sed kiel mem la aero... post iliaj ventoj
trabrilas la stelo, la foraperanta
infano kun siaj veoj, kiu nenion
komprenas, nur ploregas, balbutas,
per kvin sensoj atentas unu vizaĝon,
atentas kapteblajn vortojn,
atentas enbuŝigeblajn vortojn,
unu vorton de vortoj atentas...
mi adiaŭas ankaŭ lin... reakiri
per procesoj eblas nenion, pli fortas
Filipo ol la vortoj, al Zeŭsaj
signoj li kroĉas sin per okuloj.

Tradukis: Imre Szabó

Esperanto-memortabulo en Siberio

Foto de Anatolo Gulidov (Tomsk)

Meze de la vastega Siberio, proksime al la riverego Ob situas la grandurbo *Tomsk.* Interne de la urbo negranda domo (avenuo Lenin n-ro 65) portas surmure arte skulptitan tabulon – por la preterpaŝanto surprize – kun Esperanta kaj ruslingva tekstoj. La domo servis iam por la „konsilio de militkaptitoj", do por la hungaraj, aŭstraj, germanaj kaj aliaj ekssoldatoj de la unua mondmilito, kiuj tiutempe estis dise lokitaj en multaj urboj de Siberio.

La revolucio en 1917 ankaŭ ilin liberigis de la militkaptiteco – *Julio Baghy* en pluraj romanoj rakontis pri tiama vivo de la loĝantoj kaj ekskaptitoj: la strebo al kulturo tiris multajn al lernado kaj utiligo de Esperanto!

La krueleco kaj malamikeco de la kontraŭrevolucio, de la „blankaj" oficiroj de la cara armeo, kaj la konsento kun la socialisma revolucio igis la ekskaptitojn denove preni armilon. Estis poste konstatite, ke pli ol *centmil hungaroj* batalis kune kun la profundmizere vivintaj kampuloj de Ruslando. Filoj de aliaj nacioj, kamparanoj, laboristoj, intelektuloj (inter ili rimarkinde multaj verkistoj kaj artistoj) amase defendis la popolpotencon kaj celis triumfigi la aferon de la internacia socialismo. La forta sento de internaciismo, esenca en tiu multnacia homamaso, kaŭzis – tre verŝajne –, ke la „Hungara Sekcio" (de la ekskaptitoj) krom la loka lingvo volis *memorigi en la Internacia Lingvo* – kaj nek hungare, nek per alia nacia lingvo de la kunbatalantoj: „ETERNA MEMORO AL EKZILITOJ EN SIBERION DE IMPERIALISTA MILITO HEROE PEREINTAJ POR MONDA SOCIALA REVOLUCIO" — HUNGARA SEKCIO, 1921.

E.F.

Esperanto-novaĵoj el Sovetio

Dum la pasinta somero estis aktivaj sovetaj esperantistoj en multaj lokoj en Sovetio. Okazis grandaj someraj tendaroj apud Moskvo, en proksimeco de Taŝkento, en Estonio estis speciala tendaro por lernantoj, lernintaj Esperanton en lernejoj, la tradicia tendaro estona „Esperanto kaj naturo" fariĝis jam tutsoveta per partoprenintoj el Moskvo, Leningrado, Ukrainio, Siberio. En Latvio tre aktive agadas kun junularo la energia gvidanto T. Bercis, en Samarkand aktivas en sciencaj direktoj A. Jonesov kaj aliaj studentoj.

Estona Ministerio por Klerigo akceptis Esperanton kiel fakultativan lernobjekton en la oficialan liston kaj nun en estonaj lernejoj eblas instrui la lingvon ekde la 5-a klaso (11-jaruloj). Aperis jam dua eldono de la lernolibro por lernejoj estonaj de J. Palu. En preparo estas „Legolibro por lernejoj" de la sama aŭtoro, kaj en 1982 aperos la dua eldono de la lernolibro de J. Ojalo, tralaborita kaj kun pli granda vortara parto.

Laŭ la ĵuskontraktita oficiala „Kontrakto pri kunlaboro inter USSR kaj GDR" estas fiksita ankaŭ la kultura kunlaboro por esperantistoj. La proponon de la ĉefsekretario de la Esperanto-Asocio de Germana Demokratia Respubliko d-ro Detlev Blanke favore akceptis jam la Estona Filio de ASE, prenante en sian laborplanon krei densajn kulturajn ligojn kun ĝemelurboj Tallinn kaj Schwerin, kaj inter la estonaj kaj la ŝverin-regionaj esperantistoj.

La Estona Filio de ASE ĉijare aranĝos someran tendaron por lernantoj de Esperanto, tendaron por junularo, kaj oficialan kurson por Esperanto-pedagogoj. Laŭplane oni laboras ĉe kelkaj fakvortaroj en kunlaboro kun litovaj kaj aliaj sovetaj esperantistoj.

En du estonaj lernejoj oni amase lernas Esperanton en la 5-aj kaj 6-aj klasoj (11-12-jaraj gelernantoj). Oni jam atendas korespond-amikojn. La adresoj de la lernejoj:

200016 TALLINN, 10. Keskkool, Esperanto, Estonio,
200029 TALLINN, 44. Keskkool, Esperanto, Estonio, USSR.

La amikeco devas komenciĝi en junaj jaroj, Esperanto estas por tio la plej konvena helpilo, opinias estonoj.

Johannes *Palu*

Preferata formo de lingva perfektiĝo en Japanio estas *kunloĝadoj.* Tio signifas, ke certan tempon – ordinare 2-5 tagojn – esperantistoj de la sama urbo aŭ regiono loĝas kune, kaj dum la kuna restado oni klopodas uzi nur Esperanton. La vigla Esperanto-Klubo de la nord-japana urbo *Yamagata* de tempo al tempo organizas *ski-kunloĝadon:* la lasta tia aranĝo okazis inter la 19-a kaj 21-a de februaro 1982. Kiel videblas sur la foto, tiun aranĝon partoprenis ĉefe gejunuloj.

Harijs Skuja

La plej eta perlo de la mondliriko

Kie ondoj de Balta maro impetas kontraŭ la norda bordo de Kurzeme, en 13 vilaĝoj ĉiam ankoraŭ hejmas la lastaj reprezentantoj de finno-ugra popolo – la livoj. La livoj loĝas ankaŭ en la urboj Ventspils kaj Riga. De ili hodiaŭ restis ankoraŭ 150 homoj. La livaj historio, kulturo, folkloro estas firme ligitaj al la latva, ĉar historie tiuj ĉi du popoloj ne malpli ol jarmilon vivas apude, malgraŭ ke la latvoj apartenas al la baltoj. La latvoj montriĝis pli vitalaj – iom post iom ili ensorbis la livojn. Al tio helpis ankaŭ strebadoj de diversaj konkerintoj (precipe de germanoj) ekstermi la livojn, kaj ankaŭ naturkatastrofo – la pesto, kiu tre severe trafis la livojn de Kurzeme.

Siatempe livoj priloĝis la tutan marbordon de Riga-golfo, la nordan ekstremon de Kurzeme kaj la teritorion inter la riveroj Daŭgava kaj Salaca. Ili estis la unuaj, kiuj renkontiĝis kun la germanaj komercistoj kaj konkerantoj en Riga. Iom post iom la teritorio, priloĝata de ili, malpligrandiĝis. Jam en la 19a jarcento ĉesis ekzisti la livoj de Vidzeme, kaj pro la sama kaŭzo ni povas paroli hodiaŭ nur pri poezio kaj literaturo de la livoj de Kurzeme ĝenerale, ĉar la livoj de Vidzeme formortis antaŭ ol kreiĝis la liva skribado, kies komenco estas serĉenda en la jaro 1861.

Antaŭ proksimume 5 jaroj hazarda okazo turnis min al la liva liriko. Ĝis tiam mi eĉ ne konjektis, ke livoj ankoraŭ ekzistas, ĉar la nocio „livoj" por mi estis historia kategorio ligita kun la bataloj kontraŭ la germanoj kaj aliaj invadintoj sur la teritorio de nuna Latvio en la komenco de nia jarmilo certe, similaj nesciantoj en Latvio plimultas ol sciantoj, tial venis al mi ideo kolekti la tutan livan poezion, traduki ĝin en la latvan lingvon, samtempe konservante por la monda liriko tiun ĉi perleton, pri kies ekzisto praktike neniu sciis ion, sed sciantoj pro diversaj kaŭzoj ne atentis aŭ forgesis ĝin.

La laboro entute ne estis tiel simpla kaj facila, kiel en la komenco mi imagis. Mi ne fordoniĝos pli detale al tiuj rememoroj – ni parolu pri la rezultoj. Dum kvin jaroj mi sukcesis kolekti proksimume 300 versaĵojn kaj versprovojn, kiujn postlasis 30 aŭtoroj. Ili ĉiuj estas verse tradukitaj en la latvan lingvon. Parto estas jam pli frue tradukita en la estonan, finnan kaj hungaran. Mi organizis la tradukadon kaj publikigon de ili en la danan, rusan kaj Esperanton. Mi sukcesis kolekti pli-malpli detalajn biografiajn informojn pri ĉiuj aŭtoroj, kaj tio prezentis ne malpli da malfacilaĵoj ol la kolektado de la versaĵoj. Tio direndas ankaŭ pri la portretoj de aŭtoroj.

Neniuokaze mi sukcesus sola fari ĉi tiun laboron, tial mi volas eluzi ĉi tiun publikaĵon, por danki al ĉiuj, kiuj helpis min en mia laboro.

Mi opinias, ke la liva liriko estas ne nur liva, ne nur latva, ne nur finno-ugra literatura heredaĵo, ne nur literatura heredaĵo de la sovetaj nacioj. Ĝi estas de la unua ĝis la lasta verso literatura heredaĵo de la mondpopoloj, sendepende de tio, kiom sukcese aŭ malpli sukcese estas verkitaj la kolektitaj 300 versaĵoj – ili estas materialo, kiu povas unuvice ekinteresi UNESKO-n, kaj en neniu okazo ĝi estas forgesenda aŭ perdenda.

Ellatvigis: Arturs Kubulnieks

Kibernetiko kaj la Internacia Lingvo

Ekde la 23-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1983 en Namur (Belgio) okazos la jubilea, 10-a Internacia Kongreso de Kibernetiko. La laborlingvoj de la aranĝo estos la angla, franca kaj duafoje la Internacia Lingvo Esperanto.

Dum la Kongreso funkcios jenaj simpozioj: Kibernetika Ekologio; Kibernetika Ekonomio kaj Sociokibernetiko; Lingvokibernetiko; kaj Kibernetika Pedagogio. La Instituto pri Kibernetiko Berlin & Paderborn (la gvidanto: prof. dr. H. Frank, adreso: Kleinenberger Weg 16 B, D–4790 Paderborn, FR Germanio) alvokas ĉiujn fake kaj lingve kompetentajn personojn aktive partopreni la kongreson kaj jam baldaŭ anonci temojn de siaj prelegoj.

La Internacia Lingvo estos laborlingvo de ĉiu simpizio kaj en unu el la kvar sekcioj. Pro ke kibernetiko estas ponto inter diversaj disciplinoj, estos bonvenaj fakuloj de ĉiuj najbaraj sciencoj.

La ĉefa celo de la Instituto pri Kibernetiko estos pritrakto de tiaj problemoj de la kibernetika pedagogio kaj lingvokibernetiko, pere de kiuj oni povus elmontri kunligojn kaj kunefikojn de la kibernetiko kun la Internacia Lingvo. En 1976 oni inaŭguris eldonon de la internacilingva fakliteraturo pri la kibernetika pedagogio kaj pri lingvokibernetiko kaj estas planite daŭrigi tion.

Post nelonge estos aĉetebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio kaj Instituto pri Kibernetiko internacilingva libro «Kibernetiko de la Homa Lingvo» je la prezo de 15,- GM.

La aliĝkotizo al la 10-a Internacia Kongreso de Kibernetiko estos 3000,- belgaj frankoj (ĉ. 100 dolaroj), kaj prelegontoj rajtos ĝui rabaton de 50%-oj.

Aŭtoro de kvin presataj libroj

Intervjuo kun István Nemere

Kiam vi naskiĝis?
En 1944.
Kiam vi iĝis esperantisto?
En 1963.
Kiulingve vi kapablas paroli?
Hungare, Esperante, pole.
Kio estas via profesio?
Verkisto.
Ĉu nur tio?
Nur.
Kaj antaŭe kio vi estis?
Ĉefe bibliotekisto, sed entute mi havis 14 profesiojn, kiujn mi konsideras kolektado de travivaĵoj por mia vera okupo, do por la „verkisteco".
Kiom vi laboras?
Dek du horojn ĉiutage.
Do vi estas vere diligenta. Kion vi verkas?
Mi plej multe laboras por la hungara gazetaro. Krome, mi ankaŭ tradukas, ĉefe el la pola kaj ankaŭ el la Internacia Lingvo.
Kion el la lasta?
Artikolojn el la internacilingva gazetaro, kiuj foje-foje aperadas en hungaraj periodaĵoj.
Kaj ankaŭ librojn...
Jes, mi publikigis ĝis nun 1760 paĝojn, krom la tradukoj.
Nome?
En 1974 aperis **La poŝtkodo de la timo**, post tri jaroj **La Triton-murdoj**, en 1979 **Artaĵrabistoj sur la etplanedo.** En la sekva jaro du libroj: **La fantazia onklino** kaj **Mortu kantante.** En la pasinta jaro ekvidis la lumon tri miaj volumoj: **La sekreto de l' kupolarbo,** La **Neŭtron-operacio** kaj **Blinda birdo.** Ĉiuj ili estas romanoj.
Sufiĉe granda listo, kaj kion vi verkas Esperante?
Inter miaj libroj kaj noveloj estas kelkaj, kiujn mi paralele verkis en du lingvoj, kaj hungare kaj internacilingve. El ili la plej populara estas la **Neŭtron-ĉantaĝo,** kiu hungare havas la jam menciitan titolon: **Neŭtron-operacio.** Ĝi estas io, kion oni povus nomi „pseŭdofaktaĵo". Eble tio estis unu el la malmultaj Esperantlingve verkitaj libroj, kiuj – kvankam alilingve – atingis la eldonkvanton 120 000 ekzempleran.
Tiu ĉi lasta cifero montras, ke vi, kiel hungara verkisto, estas unu el la plej legataj. Tamen vi verkas ankaŭ en la Internacia Lingvo. Kio ekinteresis vin en tiu ĉi idiomo?
Malfacilas paroli pri tio. Granda estas la danĝero de la banaleco. Tamen, mi ne timas diri: mi esperis, ke tiu ĉi lingvo malfermos antaŭ mi la vojon kaj fizike, kaj psike.
Kaj kio nun interesas vin en Esperanto?
Fakte la samo, kio entuziasmigis min jam en mia 19-jara aĝo, sed nun en alia nivelo. Se oni verkas por la hungara publiko, oni devas pensi pri homgrupo kun difinita informaro en la memoro. En la kazo de esperantistaro pri tio oni ne bezonas pensi, ja tiu ĉi lingvo aĝas nur malpli ol cent jarojn ankoraŭ. Do ĝia kulturo havas malpli fortan tradicion. Mi povas lokigi la heroojn al fantaziaj teritorioj, kiuj ekzistas ie malproksime aŭ estas entute elpensitaj. La manoj de la verkisto ne estas ligitaj.
Ĝis nun aperis nur hungarlingvaj variantoj de viaj libroj.
Tamen la eldonfako de HEA planas aperigi tri miajn librojn. Kaj mi esperas, ke ili fakte forlasos la presejon jam ĉi-jare.
Nome kiuj ili estas?
Novelaro, titolita **La naŭa kanalo** kaj du romanoj: **La fermita urbo** kaj **Blinda birdo.** Pri ĉi-lasta temis inter miaj hungaraj libroj.
Kaj la alia romano? Ĉu ankaŭ ĝi ekzistas hungare?
Ekzistas, sed neniu hungara eldonejo trovis ĝin interesa, do ĝi aperos verŝajne nur Esperante, se el tiu ĉi lingvo ĝi ne estos tradukita alilingven.
Ĉu ĝi estas via sola tiuspeca verko?
Eĉ se tio ŝajnas stranga, ne. Mi havas romanon kun la titolo **La monto.** Ĝi ne aperis hungare, sed verŝajne ĉe Edistudio – en la Italia Pizo – ĝi estos eldonita. Eble el ĝi kaj ankaŭ el mia ŝatata **Fantazia onklino** oni faros filmon en Hungario. Almenaŭ kelkaj filmreĝisoroj tion arde deziras.
Vi menciis Edistudion, ĉu vi volas aperigi ankaŭ aliajn viajn verkojn eksterlande?
Ĝuste. Unu alian libron, la **Neŭtron-ĉantaĝon** intencas aperigi la menciita Edistudio, kies posedanto estas Bruĉjo Kasini, kaj alia eldonejo, nome **Fonto** interesiĝas pri miaj noveloj.
Ĉio ĉi estas vere ekscita. Vi, la popularo hungara verkisto eble rapide fariĝos same konata en Esperantio. Ĝuste tial mi demandus: ĉu vi partoprenis –as, –os la movadon?
Estante junulo, mi fervore agadis en la Esperanto-medio. Mi estis urba sekretario kaj instruis Ĉe-metode. Poste mi dufoje edziĝis, kaj vivis ses jarojn en Pollando, pli poste mi devis trovi mian lokon hejme. Do dek jaroj – inter 1969 kaj 1979 – forfalis por mi el la movada agado.
Kaj nun?
Mia ĉefa movada agado estas verki Esperantlingve.
Ankoraŭ unu demando: kiel vi vivas?
Mi loĝas en la provinco, ĉe la landlimo, tamen sufiĉe proksime al Budapeŝto, en la urbo Esztergom. Mi ŝatas la silenton, en kiu mi povas bone labori. Eĉ telefonon mi ne havas, por ke oni ne povu ĝeni min per ĝi. Unu tagon ĉiusemajne mi pasigas en la ĉefurbo por aranĝi miajn aferojn.
Kaj nun sekvas la lasta demando: kiuj estas viaj planoj?
Mi povas respondi per unu sola vorto: verki.
Al tio en la nomo de nia legantaro mi deziras al vi sanon kaj sukcesojn.

Péter András *Rados*

István Nemere

Kie vi estas ?

Jam de semajno la tuta tendaro estis febre ekscitita. En la bazo ĉiuj parolis nur pri Ili: „Kiam Ili alvenos? " – oni demandadis. Cibernetikistoj, direktistoj de kosma trafiko, komputistoj – ĉiuj. Psikologoj eĉ nomis jam la alvenontojn: nomis Ilin „bortidoj", ĉar Ili estis alvenontaj el la planedo Bortis.

Ekde la komenco de niaj interrilatoj ĉiuj okupiĝis pri ni. Alvenis multaj nigre vestitaj ĝentilhomoj per longaj nigraj aŭtoj. Niaj radarantenoj senĉese observis la ĉielon. Nia komandanto, Kolter ĉiuhore devis informi la redaktorojn de televid-gazetaro.

– Bortis troviĝas en la Glanders-Galaksio – diris li jam centmilan fojon. – Ties loĝantojn ni nomas bortidoj. Ilia grupo ĝuste veturas al la Tero; antaŭ kelkaj tagoj ni ekhavis la radiokontakton kun ili. Tiu kontakto provizore estas nur unudirekta. Ni aŭdas ilian elsendon, sed ili ne aŭdas nin.

– Kio kaŭzas tion? – demandis unu el la raportistoj..

– Mi eĉ ne konjektas. Niaj sciencistoj nun prilaboras la problemon... Do, la bortidoj proksimiĝas. Morgaŭ ili alteriĝos ie ĉirkaŭ nia bazo.

– Kiel vi decidis pri la loko de la alteriĝo?

– La bortidoj radiomesaĝis, ke ni dissendu konstantan direktigan signalon por ili.

– Kiamaniere vi komprenis ilian parolon?

– Helpe de tradukmaŝino. Nia komputilo tradukas la vortojn de bortidoj. Kompreneble troviĝis tie vortoj, kiujn ni ne komprenas... Sed entute ni povas fiere deklari: alvenis la momento – unua en la historio de la homaro – ke ni kontaktiĝos kun estaĵoj inteligentaj de alia planedo, eĉ de alia galaksio.

Sekvonttage malsereniĝis la ĉielo.

Nigraj nuboj kolektiĝis super la bazo. Ĉe la ĉefa konstruaĵo de la bazo, sur la placo staris tribuno kovrita per verda drapo. Antaŭ ol komencis pluvi, fulmoj zigzagis. La nigre vestitaj viroj rapide fuĝis en la domon – sur la betono kelkajn forlasitajn cilindrajn ĉapelojn rulis la vento. Ĉiuj kolektiĝis en la centra direktejo.

Je la horo 11.30 alvenis la unua tiutaga mesaĝo de la bortidoj: „Ni jam estas en la atmosfero."

La ĉeestantoj treege ekscitiĝis. Tiom da televidkameroj staris ĉie, ke oni apenaŭ povis moviĝi. Kolter interparolis kun du ŝtatestroj, poste reiris al la radarekranoj. Sed la fremdan spacveturilon oni ankoraŭ ne vidis.

Je la 11.40 alvenis la dua mesaĝo: „Ni flugas laŭ via via direktado. La spacveturilo estas varmega."

– Kompreneble, ke ĝi estas varmega – diris iu. – La kovraĵo de spacveturilo frotiĝas kun la atmosfero kaj tio faras varmegon. Je tia rapideco...

– Jam ni devus vidi ilin – diris alia fakulo. Sed sur la radarekranoj aperis eĉ ne unu lumpunkto. Tiuj radaroj elmontras nur objektojn pli grandajn ol unu metro...

– Kaj se ili estas... tiel etaj? – demandis en la tuja silento iu virino.

– Jam mi legis tian novelon – rakontis Kolter. – Post alteriĝo la homoj devis serĉi la eksterteranojn helpe de lupeo...

– Kaj se nun vere tiel okazos? – demandis alia voĉo.

Ni atendis.

La tempesto ne ĉesis; super la grandega alteriĝejo malalte pendis la ŝvelaj, nigraj nuboj. La vento ŝiradis la drapon de la tribuno.

Post la 12-a horo ekbruis la tradukmaŝino:

– „Via direktil-radio eksilentis. Kio okazos? "

Kolter ordonis kontroli la radioelsendilon. Evidentiĝis, ke antaŭ kelkaj minutoj ĝi difektiĝis. Oni tuj enŝaltis la rezervan aparaton.

Sed la bortidoj verŝajne ne retrovis la sonon de la direktilo. Tion pruvis ankaŭ ilia sekvonta mesaĝo je la 12.16:

„Via elsendilo silentas – ni provas alteriĝi sen ĝia helpo."

– Sed kie? – demandis Kolter kaj almenaŭ cent aliaj buŝoj. La maŝinoj bruis, la radarekranoj lumis malplene. Kelkaj raportistoj kolektiĝis ĉe la fenestroj, sed kompreneble ili vidis nenion. Nur la pluvegon. Sur la betona placo jam kolektiĝis la akvo en flakegoj.

– Sur la radaroj...? – demandis Kolter.

– Nenio – respondis ĥore la observistoj.

– Tamen ili estas liliputaj – diris iu voĉo.

Je la 12.24 alvenis denove „telegramo":

„Ni alteriĝis."

Ĉiuj ekkriegis. Kelkiuj forkuris en la pluvon, ĉirkaŭiris la domegon. Iuj volis per ĵipo elveturi sur la betonkampon, sed Kolter tion malpermesis.

– La bortidoj verŝajne estas tre etkreskaj – diris – la radaroj montrus ilian veturilon, se ĝi havus almenaŭ unumetran longecon... Do imagu, en tiel eta spacveturilo kiel etaj povas esti mem la astronaŭtoj...

– Bakterietoj – flustris iu. Kelkiuj ekridis.

– Kaj se ilia veturilo estas farita el materialo, kiun niaj radaraparatoj ne perceptas? – demandis iu redaktoro. – Mi pensas pri tia materialo, kiu estas nekonata sur la Tero.

– Ĉio estas ebla – disetendis la manojn Kolter.

– Kion vi intencas nun fari por serĉi la alteriĝejon de la bortidoj?

Kolter volis respondi, sed la tradukaparato komencis zumi. Ĉiuj eksilentis. Alvenis la plej nova mesaĝo de la bortidoj:

„Ni salutas la loĝantojn de la planedo. Kie vi estas? "

Antaŭ ol iu ajn povus eldiri eĉ vorteron, starantaj ĉe la fenestroj furnalistoj turnis sin kaj kun timkrio kuregis al la pordoj.

La spacveturilo de la bortidoj vere estis produktita el materialo, kiun ne elmontris niaj radaroj. Eble kromvole ili faris tiel... Kaj jen demando: se la radaro estus elmontrinta ĝin – ĉu eĉ la plej granda ekrano sufiĉus por tio...?

Ili proksimiĝis.

Per du paŝoj trairis la betonkampon. Unu el ili distretis la tribunon kaj la aŭtomobilojn. Alipiede li disrompis la antenojn sur la turoj. Iliaj kapoj estis super la tempestaj nuboj, do ili eĉ ne vidis, kio okazas sube, ĉe la piedoj. La konstruaĵoj de la bazo disfalis, du flugmaŝinoj enpremiĝis en la betonon, kiel alumetoj. Post ili restis nur ruinoj. Sed Ili iris, iris antaŭen kaj ilia radio senĉese elradiis:

„Kie vi estas? Kie vi estas? Kie vi estas...? ..."

Gyula-urbo de SEU



Gyula – urbo de freŝo kaj floroj

Urbo de Gyula (dju:! la) – estas nocio revokanta agrablajn travivaĵojn ĉe multaj miloj da esperantistoj. Tiu malgranda urbo en la sud-orienta angulo de Hungario jam la 20-an fojon gastigis ĉijare la partoprenantojn de la merite reputacia Somera Esperanto-Universitato. La nove alvenintaj kaj la revenintaj esperantistoj dum la jubilea SEU krom la altnivelaj, tradiciaj prelegoj povis partopreni ankaŭ pedagogian kaj komputistan sekciojn. Kaj ĉijare la unuan fojon renkontiĝis tie ankaŭ la kooperativanoj-esperantistoj.

Sed ne nur la esperantistoj ŝatas tiun bonetosan lokon, ankaŭ la turistoj ĉiam pli kaj pli grandnombre vizitas kaj revizitas ĝin. Kio estas ĝia altirforto? Antaŭ ĉio la patineco atestanta pri ĝia movriĉa historio.

Ekde mil jaroj estas loĝata la ĉirkaŭaĵo. Bestobredistaj popoloj alvenis el Malgranda Azio kaj fondis altan kulturon konatan en la arkeologio kiel *kulturo Körös* (laŭ la rivero de Gyula). Sed ĝin detruis la nova ondo de popolmigrado fine de la kuproepoko. Grekaj kodeksoj mencias la alvenintajn popolojn: *scitojn, keltojn kaj sarmatojn.* Pri la ĉeesto de *gepidoj* kaj *gotoj* atestas abundaj arkeologiaj trovaĵoj. Ekde la sesa jarcento regis *avaroj.* La kaosan epokon de popolmigrado fermis fine de la naŭa jarcento la hungara patrujkonkero.

La nomo de la urbo estas la prahungara vorto *gyula.* Tio estis la rango de la plej ĉefa soldatestro de la hungaroj. La unuan mencion ni konas el 1214. La tatara invado ne indulgis la lokon, pri la terura ruinigo kaj amasbuĉado sciigas nin *Rogerius,* kanoniko de Várad (nun Oradea en Rumanio) en sia *„Plorinda Kantiko".*

Reĝo *Karlo Roberto* (1288-1342) fondis reĝan bienegon en la regiono – la centro fariĝis Gyula. Komenciĝis prospero. En la dek kvina jarcento János *Maróthy,* la nova posedanto entreprenas grandan konstruadon: jen altiĝas la nova brikfortikaĵo, la monaĥejo kaj preĝejo de Franciskanoj. Post la formorto de familio Maróthy la bieno reiras al reĝo *Matiaso* (1458-1490), kiu ĝin donacas al sia filo *Johano.*

La pacan evoluon rompis la sukcesa *turka sieĝo* en 1566. La islama armeo estis forpelita nur en 1694. Dum tiuj preskaŭ 130 jaroj la regiono transformiĝis en senhomejon. Post la malvenkinta liberbatalo de *Rákóczi* (1703-1711) la Habsburga Imperiestro en 1720 donacas la bienrajton de preskaŭ la tuta departemento al la aŭstra kortega liveristo *Harruckern,* kiu alportas germanajn kaj rumanajn

Somera Esperanto-Universitato altiras ĉiujare centojn da esperantistoj



koloniulojn. Ekevoluas la loko, rapide urbiĝas kaj famiĝas pro la serĉataj laborajoj de la tie funkciantaj 17 gildoj. Pri la tiama riĉeco atestas la restintaj publikaj konstruajoj kaj klasikstilaj burĝaj domoj de tiu epoko. Al la urbo ligiĝas unu el la plej tristaj eventoj de nia historio: en 1849 la venkinta cara armeo sur la placo antaŭ la fortikajo transdonas la kaptitajn generalojn de la falinta hungara liberbatalo al la aŭstroj, kiuj kondukas ilin de tie rekte al la ekzekutejo.

La prospero ĉesas fine de la pasinta jarcento, kiam la urbo ricevas nur flankan fervojlinion. Post la unua mondmilito Gyula perdas siajn regionojn gravajn el ekonomia vidpunkto. En 1950 ĝi perdas ankaŭ formale sian centran rolon: la departementa rezidejo translokiĝas al Békéscsaba.

La nova erao de la urbo komenciĝis nur kiam en 1959 la esplorboroj surfacigis valoran mineralakvon. Por utiligi ĝian sanigan efikon la urbo konstruis *banejon* en la pitoreska parko de la iama kastelo. En 1962 estis renovigita ankaŭ la *brikfortikajo*, kiu estas momente la unusola reprezentanto de sia tipo en Hungario. En la konstruajo funkcias kulturcentro kaj tie okazas ĉiujare la someraj fortikajaj teatraj prezentadoj.

Gyula estas fidela evoluiganto de sia kultura heredajo. Ĝi gardas la memoron de siaj famaj naskitoj, kiel tiun de la fondinto de la hungara operarto Ferenc *Erkel,* la historiisto János *Karácsonyi* aŭ tiun de la inventinto de la kriptonlampo Imre *Bródy*. Ankaŭ la familio de la granda germana pentro- kaj grafikartisto Alberto *Dürer* devenas de ĉi tie. Dum longa tempo laboris en la urbo la komponisto Béla *Bartók* kolektante popolkantojn de la ĉirkaŭajo.

La hodiaŭa vizitanto trovas en tiu malnova urbeto multe da historiaj kaj artaj memorajoj, parkojn, amikan etoson kaj laboreman loĝantaron. La industrio unuavice bazas sin sur la agrikulturo. La plej grava estas la viandindustrio – la kolbaso de Gyula estas eĉ eksterlande konata –, sed konsiderinda estas ankaŭ uzino de laktopulvoro kaj la muelindustrio. Jam antaŭ la unua mondmilito estis fama la ŝtrumpfabriko de Gyula.

Moderna ekonomio kaj intensa kultura vivo kunplektiĝas, tradicioj kaj novaj rezultoj ebligas, ke la laborema popolo de la urbo rigardu esperplene al la futuro.

Árpád *Abonyi-Nagy*

MIHÁLY SÁROSI (1893-1982)

Ĉiam pli malkreskas nombro de niaj veteranoj... Ĵus ni ricevis la sciigon, ke la 27-an de aprilo post longa malsano finis sian vivon emerita aktoro de teatro „Vidám Szĩnpad"(Gaja Teatro): Mihály Sárosi mortis.

Dise en la mondo esperantistoj konas lian nomon – eble laŭ nomformo Mihaelo Sárossy – , kaj kiuj jam persone ne povis ĝui lian arton, ankaŭ tiuj povas rememori lin, kiel simpatian rolanton de *La Verda Koro.*

Jes, temas pri Ŝarosi, „la plej bona fratamiko" de s-ro Nadai – Julio Baghy.

Naskiĝinta en 1893 li apenaŭ komencis sian aktoran karieron – en tiama teatro „Király" –, kiam li devis soldatiĝi. Post mallonga frontdejoro, komence de la mondmilito li fariĝas militkaptito. La jaroj, pasigitaj en siberiaj garnizonoj,estis malfacilaj, tamen tie li akiris por la tuta vivo amikecon de la samsortano-kolego Julio Baghy, kaj tie li fariĝas esperantisto. Kaj en siberiaj kazernoj ili plenumas aktoran mision, teatroludas eĉ inter malfavoraj cirkonstancoj. La duvoluma dokumentaro *Hadifogoly magyarok története* (Historio de hungaraj militkaptitoj) – eldonita en la dudekaj jaroj – detale priskribas iliajn programojn, publikigas plurajn fotojn kaj karikaturojn – ĝuste el kolektajo de Sárosi. (Bedaŭrinde, tiuj dokumentoj neniiĝis dum la dua mondmilito.)

La periodo inter la du mondmilitoj signifas la plej fekundajn jarojn por Sárosi. Li fariĝas membro de Royal Orfeum en Budapeŝto, aktoras, kantas, gitarludas kaj hungare kaj en Esperanto. Li ankaŭ komponas, interalie li muzikigas plurajn poemojn de Baghy. Tiutempe ilia amikeco kaj kunlaboro plie profundiĝas. Pri tio atestas ankaŭ ekzemplero de *Viktimoj* (gardata en la kolektajo de K. Fajszi), kun la sekva dediĉo: *„Kun sincera amikeco al mia amata Miĉjo Sárosi.*

Kara, rememoru pri tagoj de kune pasigitaj jaroj, kaj larmu, ridetu kune kun via: Julio."

Aperas du liaj hungarlingvaj diskoj, ankaŭ du esperantlingvaj. Li partoprenas kongresojn, kontribuas al ties artaj programoj. Al lia aktora kaj kantista kariero kaj talento pleje konvenas la tiel nomataj „leĝeraj ĝenroj": komedioj, kanzonoj ktp., tamen li sukcese plenumas ankaŭ dramajn rolojn, ekz. en *Ginevra* de Privat.

Post la dua mondmilito li fariĝas membro de „Vidám Szĩnpad", kie li ludas ĝis la pensiiĝo.

Li partoprenas Universalan Kongreson en 1966 en Budapeŝto, kaj post unu jaro ĉeestas la entombigon de la kara amiko, Julio Baghy. Sekvontjare li kontribuas ankoraŭ al Baghy-memorvespero, aranĝita de Budapeŝta esperantista junularo, kie li kortuŝe aŭskultis sian melodion komponitan por la Baghy-romanco: *Ruĝa rozo...* – sed poste la aĝo kaj malsanoj venkis lian korpon. En la lastaj jaroj li vivis retiriĝinte, la korpa feblo malhelpis lin iri ien ajn, ankaŭ vizitantojn li ne povis akcepti. Li do ne estas plu inter ni. Sed gramofondiskoj kaj sonbendoj gardas liajn kantojn, *La Verda Koro* (dum aŭtuno reeldonota de HEA) de generacio al generacio de esperantistoj transdonas la nomon Ŝarosi – dum vivos esperantistoj en la mondo, ili gardos lian memoron.

M. *Fejes*

Esperanto – art-peranto

Ekspozicio de Hugo Landheer en Hungario

Gesinjoroj Landheer intervjuataj

En la Departamenta Kulturcentro de Szentendre – pitoreska urbo de muzeoj, pentristoj kaj galerioj –, vera hejmo de belartaj ekspozicioj, la 7-an de majo s-ro Endre Baráth, ĉefsekretario de HEA solene malfermis ekspozicion de la Nederlanda pentristo Hugo Landheer.

Specifecon de la ekspozicio kaŭzis tio, ke la ekspoziciitaj pentraĵoj per nobla gesto estis donacitaj al Hungara Esperanto Muzeo far la maljuna majstro.

Naskiĝinta en 1897 en Schiedam kaj studinta ĉe Belarta Akademio en Hago, Hugo Landheer poste ankaŭ profesoris tie. Li pentras ekde sia 10-a jaro, partoprenis en multaj enkaj eksterlandaj ekspozicioj. Nuntempe li vivas en Aerdenhout, kaj li ĉiutage laboras: pentras kaj instruas. Lia vigleco korpa kaj spirita ne atestas pri la aĝo: kaj la majstro kaj lia edzino aspektas multe pli junaj, ol efektive ili aĝas. – Ĉu tio dankeblas al vegetarana vivmaniero (s-ino Landheer estas kasistino de TEVA – de tie estas la kontakto kun Esperanto), aŭ al la per arta laboro atingita harmonio?

Krom Kultura Centro de Aerdenhout, multaj Nederlandaj muzeoj gardas liajn pentraĵojn, 72 liaj bildoj estas ekspoziciitaj en Torun, aliaj 60 en muzeo de Dudince en Ĉeĥoslovakio.

Liaj oleo-pentraĵoj prezentas diversajn pejzaĝojn de la naskourbo kaj naskolando. Marbordo, barkoj, vent-muelejoj, montaraj regionoj, kapeloj, preĝejinternoj, kastelruinoj.

Aliaj bildoj prezentas malnovan francan vilaĝon, Hispanian aŭ polan pejzaĝon. La preferata besto, la ĉevalo aperas sur aliaj bildoj: Ĉevalo kun hundo, Ĉevalo en blua tono, Du ĉevaloj en montaro – *tiuj atestas pri amo al naturo.*

Preĝeja tombo
Kastelruinoj

La Jugoslavia kaj Hispania pejzaĝoj apenaŭ diferencas unu de la alia sur la bildoj de Hugo Landheer, kiu jam atingis sintezon: li substrekas kaj emfazas per sia peniko la esencajn trajtojn, li trovas kaj prezentas en ĉiu loko la universalan belecon de Naturo.

Tero Nederlanda naskis plurajn famajn pentristojn, kiuj apartenas jam al la tuta mondo. Hugo Landheer – malfrua posteulo de Rembrandt – per sia vivoverko ankaŭ kontribuis al plibeligo, plibonigo de nia mondo. Liaj bildoj plezurigas, donas impresojn, vekas memorojn – efikas kaj vivas.

La kolektaĵo estos prezentata ankaŭ en pluraj provincaj muzeoj. Komuna vizito de esperantistoj estas organizebla.

Hugo Landheer estas 86-jara. Ni deziras, ke li ankoraŭ longe daŭrigu sian artan laboron por plezuro de la bel-amantoj.



Márton Fejes **Ĉevalo kun hundo**

Fotoj de J. Regős

Nederlanda urbo



István Fábián

Advento

(Vortoj de M.F.) *

Vi tre bone scias, Sinjoro Prezidento, kio okazis:
adventa promeso kaj ni vane atendadis.
Super la akvo nun laŭtaj bekoj
disĉifonigas la tolon, el la poŝoj
kun elano „hundo-ĉagreniĝu" elgrimpas la manoj
kaj la silento – porokaza dekoracio –
dispeciĝas per trombonoj.
Konservas nin la tempo per armiloj:
infanoj, festoj, gvatantaj vejnoj,
nin gardas pluvoj, neĝfaloj, dramoj alkoholaj.
Kontraŭ balbutado krevas la tamburo, mi
festas kun bastonoj enmane.
Kokardajn vundojn al kiu montri, se trans-
borde ridas dio, Sinjoro Prezidento?
Mia helpilo la senforteco, Sinjoro!
pri la hezito mi blekas, Sinjoro!
ne estas nia tasko atendi
la morton patrinan, Sinjoro!
Kiu stumbladas ĉe la patra tombo? Sinjoro!
el ni malaperas jam eĉ la hezituloj
senspure.
Kiu murmuras interne kaj kiu
kaŝfuĝadas ekstere, kiaspecaj
banditoj miksiĝas inter nin, Sinjoro Prezidento?
Kiaspeca kontrakto jam denove?

El la hungara: Imre *Szabó*

** Milán Füst (1888-1968), hungara poeto*

PANORAMO

Ernő Szakál
en la urbocentro
de Sopron

Gotikaj skulptaĵoj revivigas

Ernő Szakál, Munkácsy-premiita skulptartisto-restaŭristo de jardekoj savas kaj renovigas gotikajn skulptaĵojn, ornamaĵojn de mezepokaj konstruaĵoj de Hungario, speciale en Buda, Visegrád kaj Sopron. Pro la signifaj rezultoj sur la tereno de renovigado de gotikaj artobjektoj li estis distingita ĉijare per la Eŭropa-premio pri Protektado de Historiaj Monumentoj.

Pasejo de la nova limstacio ĉe Hegyeshalom

Landpordo pli larĝa

Por plifaciligi la turismon oni ekfunkciigis ĉe Hegyeshalom unu el la plej grandaj kaj modernaj limstacioj de Mez-Eŭropo. Oni povas plenumi la limkontrolon de 17 en- kaj 17 elirantaj motorveturiloj samtempe, multe mallongigante per tio la atendotempon. La malnova limtrapasejo restas uzata por la kamionoj.

Diskopremioj el Francio

La Gramofondisko-akademio Charles Cros de Parizo ĉiujare aljugas siajn premiojn al la plej sukcesaj diskoj de la mondo. Ĉijare por hungaraj diskoj estis donitaj la premioj de la franca akademio. Tiuj estas: Pavo-variaĵoj, Dancoj de Galánta, Dancoj de Marosszék de Kodály, krome la diskoj eldonitaj okaze de la Bartók-centenario.

La ensemblo de lernejanoj de Siroka Laka en Budapeŝto

Bulgaraj infandesegnaĵoj

La 24-an de majo en la kadro de la Monato de Paco kaj Amikeco estis inaŭgurita ekspozicio de infandesegnaĵoj en la Bulgara Kultura kaj Informa Centro en Budapeŝto. La ekspozicion malfermis István Haraszti, sekretario de la Asocio de Hungaraj Pioniroj. Dum la solena inaŭguro la ensemblo de popolmuzika faka mezlernejo de Siroka Laka prezentis bulgarajn popolkantojn.

PANORAMO



Laboras la eksterlandaj filmistoj en la teatro de Kecskemét



Tito-strato en Budapeŝto

Pri Tito, antaŭa prezidento de Jugoslavia Socialisma Federacia Respubliko estas nomita strato en la 4a distrikto de Budapeŝto. En la solenaĵo festparolis Zoltán Szépvölgyi, urbestro de Budapeŝto, poste Milan Veres, ambasadoro de Jugoslavio rememoris pri Tito. Sur la memortabulo estis lokitaj florkronoj de la Hungara Socialisma Laborista Partio, de la Prezidio kaj de la Registaro de Hungario, kaj tiu de la jugoslavia ambasado en Budapeŝto.

Kantoj el la 16a jarcento

La unua Internacia Renkonto de Liuto-artistoj estis inaŭgurita la 23-an de majo en la parada salono de la fortikaĵo Nádasdy en Sárvár. Dum la unusemajna renkonto artistoj el Jugoslavio, Svislando, Usono prezentis kun granda sukceso kantojn el la 16-a jarcento. Hungarion reprezentis la ensemblo Bakfart-Consort kun gvidado de Dániel Benkő, kies arto de sur diskoj kaj el koncertoj estas konata ankaŭ eksterlande.

Richard Burton en Kecskemét

Filmo pretiĝas en angla-hungara kunlaboro pri la vivo de Richard Wagner, kaj pluraj ĝiaj scenoj estas filmataj en la teatro de Kecskemét. Richard Burton ludas la rolon de la komponisto, la reĝisoro estas Tony Palmer, la kameraisto Vittorio Storaro. Dum la filmado la grandnombra teknika stabo „transformis" la teatron de Kecskemét jen la operdomo de Parizo, jen tiu de Dresdeno aŭ de Bayreuth.

La unua hungara poemo

Post sesjarcenta migrado denove troviĝas hejme la t.n. Sermones-Kodekso, unu el kies folioj surhavas la plej ekzemplon el la hungaraj lingvaj memoraĵoj antaŭ la 14a jarcento; ĝi estas la Prahungara Plorkanto de Maria, la unua konata poemo en la hungara lingvo. Delegacio de la Romkatolika Universitato de Leuven, Belgio, transdonis la valoran kodekson al la Hungara Nacia Biblioteko Széchenyi.

Pieter de Somer transdonas la Sermones-Kodekson al d-ro Péter Zircz



HÉLIOSZ

Kolortelevidilo produktita per la plej moderna teknologio kaj funkcianta per infraruĝa telemanipulado.
Taŭgas por alkonekti vidmagnetofonon.

Prezo: 29 800 Ft **Garantia tempo: kiel ĉe ĉiuj Orion kolortelevidiloj – 3 jaroj!**



REVUO DE REVUOJ

Vere FONTO de bonaj literaturaĵoj estas tiu ĉi beletra revuo de W. *Auld,* sur kies 46 paĝoj aperas kalejdoskopo de la mondliteraturo – kaj ne nur moderna – kian oni malofte trovas nacilingve. Recenzi tiun abundon estus vana peno – oni jam mem devas foliumi ĝin. Se mi jam devas iun eron mencii laŭ mia persona prefero, ĝi estu la groteske drameca brazila novelo „Birdaraneo" en la n-ro 18 (de S. *Jockymann,* elokvente tradukita de Leopoldo H. *Knoedt*). Impresega!

Meritas atenton la rimarkoj de Probal *Daŝgupto* en ESPERANTO pri la internacia rolo de la angla lingvo, kiu certagrade transprenis tiun de la franca, sed... en alia maniero. Laŭ la aŭtoro la franca funkciis ĉefe por la intelekta (kaj reganta) elito, por la diplomatio; la angla ekregis en la sferoj de la komerco, popmuziko, grandinstitucioj, dume en la persona ĝi restis plejofte nur supraĵa, kion mi povus karakterizi per la „ĝis revidonivelo". Daŝgupto opinias, ke tiu stato kvalifikas nian mondon mem: la interlingva bezono atingis ĝis nun *nur ĉi tiun gradon,* ĉar la interpersonaj, pli intimaj kontaktoj ankoraŭ ne venis en la unuan vicon. Ĝuste Eo prezentas al la popoloj tiurilate tre vastajn eblojn, multe pli ol la franca kaj angla.

La dedukto ŝajnas realisma kaj pensiga, kie apenaŭ kaŝas sin la plua ŝtupo de la evoluo. Ĝi antaŭvidas, ke iom-post-iom (baldaŭ?) ampleksiĝos la interpersonaj (ne-instituciaj), kvazaŭ interfamiliaj kontaktoj, kies grandaj bezonoj *postulos* tian interlingvon, interkomprenilon kia estas nia Eo! *Nia* mi skribis prave, ĉar estas ni kiuj jam nun – bezonante verajn interpersonajn kontaktojn kun alilingvanoj – „postulis" kaj akiris por ni la plej konvenan interlingvon.

Ĉu ni – aŭ pli precize: oni – vere akiris Eon, tio estas jam alia temo, sed certe ekzameninda. Lingvon, ĉiun ajn, oni „scipovas" nur laŭ certa grado – tion mi pensis legante la interesan artikolon de Bernard *Golden* en KOMUNA E-GAZETO de Nederlando. Li prudente avertas, ke malgraŭ ĉia aserto, Eo ne estas tiomgrade facila lingvo, kiel oni emas kredi. Kompreneble temas pri la perfekta, senerara lingvouzo. Sed lingvaj eraroj, ankaŭ pekoj, ĉie en la mondo estas abunde observeblaj *eĉ en la gepatra lingvo* fare de kampulo aŭ de ĵurnalisto, ĉu en parolo, ĉu en skribo... Kaj se temas pri lernita (fremda) lingvo, ĝuste pro ties fremdeco neeviteble intervenas kaj enmiksas sin lingvo-psikologiaj faktoroj – malfavore. Sekve – dependa de la lingva instruiteco, intelekto, „lingvosento" kaj aliaj personaj kapabloj – nove-denove oni „kapablas" fari diversgradajn erarojn aŭ pekojn kontraŭ tiu fremda lingvo.

Kvankam vere facila kaj travidebla, eble nur kun sia cento (!) de reguloj, mem Eo ne povas esti escepto tiurilate.

Kvankam mi persone ne ŝatas lingvajn pekojn (ankaŭ ne kontraŭ la hungara), tamen oni devas konscii la (tre) simplan veron: nur tiu ne eraras, kiu ne uzas ĝin! Tio ne estas absolvo de pekoj, sed lingvistoj (e-logoj) devas konscii, ke apud la eternaj komencantoj – kiuj ĉirkaŭas ĉiujn lernindajn lingvojn – nia relative facila lingvo ĉiam kuntrenos – espereble malkreskante – iom da pli-malpli gravaj lingvaj eraroj kaj en parolo, kaj en skribo. Memkompreneble restas la devo de ni ĉiuj plugi kaj forigi la erarojn per konstanta lingvoflega agado, foje eĉ per tiucela lukto. La nova revuo PLANLINGVISTIKO – laŭ mia kompreno – jam komencis siaflanke tiun lingvoflegadon, ankaŭ la lukton, i.a. publikante de la sama aŭtoro utilan artikolon pri la „hungara dialekto", t.e. pri tipaj eraroj de hungaraj esperantistoj. La redaktoro, J. *Lindstedt,* detale-kritike atentigas i.a. pri malkonsekvencaĵoj en la cetere „plej bona kaj kompleta priskribo de Eo"; Plena Analiza Gramatiko. Li rimarkis en ĝi ankaŭ plurajn signojn de Eŭropcentrismo, kiujn mi vidas en interrilato kun la tro fidela sekvo de la – jam ne kontentiga – tradicia gramatika skolo. Certe multaj atendas la daŭrigojn de tiu recenza eseo.

La ruĝkovrita MONATO igas sin eĉ pli kolora per la vere larĝa gamo de temoj legindaj. Mi trovas aparte laŭdinda ankaŭ la tipografian aspekton interne, ĉefe pro la „helaj" kaj grandaj literoj, favore al multaj legantoj. Inter la multaj menciindaj artikoloj, kontraste la ĉapitroj pri biciklista *migrado* kaŭzis *al mi graton* sur la nuko: kvazaŭ kontraŭpezante la vasthorizontan kaj seriozan serion de Edward *Symoens* pri la kolonia Kongo, nun eblas legi pri komikaj, Ĉeplinecaj stumbladoj kaj klaŭnaj miskomprenoj de siatempe junaj biciklistoj – antaŭ duonjarcento. La junuloj ree kaj ree misvagas; eĉ tutan tagon ili flankenpedalas de la landvojo en la kotan terenon, serĉas vojon, alifoje landlim-trapasejon, kie ĝi ne estas (ekzemple meze de maizokampoj). Sed eble ilia plej ĉarma Munhauseniado estas la mistera trapaso de la – ne ekzistinta – *hungarapola* landlimo! Memkompreneble ili tie ekveturas *en Pollando* (efektive: tra urboj de la *Ĉehoslovaka* teritorio Rusinsko!), pagas per pola (?) mono „krono", ĉiupaŝe erarvagas, „nenie trovas" tabulojn de loknomoj (kie kelkajn jarojn poste mi facile orientiĝis kiel eksterlanda naturamiko), kaj por helpi la legantojn, ili mistordas facilanime la urbonomojn, eĉ apud la „pola" rivero *Theiss* (eble francigita nomo de Tisza oni pensos). Mi ekscitite atendas, kiel ili trapasos en la ĝangalo la landlimon inter Pollando kaj Polujo. Ni vidos.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

Sistema medioprotektado en la baseno de Tata

La protekto de la naturo, kiu ĉirkaŭas la homon, en la lastaj jaroj trovis preskaŭ monde kreskantan atenton ĉe la publiko. Ĝi estas ega zorgo por la homaro, ankaŭ tre urĝanta, ĉar la – cetere feliĉe – disvastiĝanta civilizacio jam minacas la vivnecesajn havaĵojn de nia Tero. La naturaĵoj, kiuj servas la ekziston de la homo, estas elĉerpeblaj en, sur kaj super la Tero. La homa aktivado jam atingis tiajn mezurojn, ke la pluan ekspluaton de la naturmedio oni devas direkti plej singarde, por eviti neripareblajn difektiĝojn de la vivkondiĉoj; do ŝparante kaj modere, kun indulgo, ĉiam zorgante pri regenerado kaj rekompletigo.

Sekve medioprotektado okupiĝas pri gardo de la biosfero kaj la naturtrezoroj: malhelpi la pluan polucion, ŝirmi, eventuale restarigi la originalan staton, utiligante tre kompleksajn modernajn metodojn.

Ĝis nun la medioprotektadon karakterizis t.n. „defendo-centrismo". Tio intencas precipe ĉesigi, forigi, resp. malpliigi la damaĝojn kaŭzitajn de eligaĵoj de la civilizacio. Tiun metodon oni devis forlasi, ja en la medion ne nepre alvenas malutilaĵoj. Troviĝas kategorio pli vasta ol la nura defendo, nome la „sistema medio-disvolvo", kiu celas krei laŭplane difinitan staton de la medio. Do tio jam ne identas kun la metodo de „preventado", kiu signifas preskaŭ nuran antaŭmalhelpadon de atendeblaj mediaj damaĝoj, pere de planitaj establaĵoj. Male, temas pri tiaj instalaĵoj, lokigoj kaj ordigoj, teknikaĵoj kaj uzmanieroj, per kiuj la antaŭdifinita medio-stato realiĝos. Kvankam tiu ĉi metodo nepre triumfos, tamen portempe oni devas apliki „miksitan" metodon, preferante kompreneble la tendencon al la menciita metodo.

Sendube, tio eblas nur helpe de sistemeca pripensado. Nur per tiu eblas orientiĝi inter la diversaj dinamikaj elementoj de la medio-sistemo, inter ties variaj efikoj, kaj laŭplane funkciigi ilin al la dezirinda celo. La interrilatoj ene de sistemo efektiviĝas ĉiam per *ĉenefikoj* (kies direktoj kaj „spuroj" estas determineblaj) kun karakterizaj efektoj kaj reefektoj. Oni devas nepre kalkuli en komplekso ĉiujn ĉi efektojn por decidi pri la aplikendaj intervenoj teknikaj, biologiaj, ankaŭ juraj aŭ ekonomiaj, k.a. *Konklude:* bonrezultan medioprotektadon organizi eblas nur per konscie kaj sisteme kunordigita, komplekse konsiderata vico de agoj.

La ekonomia-teknika evoluo kaj la kvalito de la medio

Pro la kreskantaj damaĝoj en la naturo oni multe disputas tra la mondo, ĉu tiuj estus necesaj sekvoj de la scienca-teknika revolucio? Certagrade la industria kaj teknika disvolviĝo neevitebleas kunportas, domaĝe, tiajn sekvojn; sed tiu evoluo, eĉ revolucio, nepre ne devas ekminaci la bazajn vivkondiĉojn de la homaro!

La teknika evoluo, ne nur damaĝojn produktas en la homa ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ plibonigas, eĉ favore transformas ĝin. Oni ne forgesu, ke nia homa ĉirkaŭaĵo konsistas ne nur el la hereditaj aĵoj de la naturo, sed ankaŭ el tiaj, kiujn mem la homaro kreis dum sia historio, pli-malpli transforminte la naturon por siaj celoj. Tiu agado certe daŭros kontinue, ne mal-

Restus ankoraŭ farendaĵoj kontraŭ aerpolucio ĉe Tatabánya



pli ties reakcioj. La malagrablaĵojn kaŭzitajn de la tekniko oni povas kuraci helpe de la tekniko kaj naturo. Per konvena zorgo eblas malpliigi la danĝerecon, malakceli la difektiĝon, ofte eĉ restarigi la originalan staton. Krome, per atenta antaŭvido oni povas preventi la malagrablaĵojn. Ne ekzistas kaŭzo por paniko, sed nepre necesas taŭga antaŭzorgado.

Se la homaro saĝe uzos siajn rimedojn, ĝi havos ŝancojn preventi pluajn damaĝojn. Tiucele gravega rimedo estas la perspektiva planado, pri kiu en Stokholmo la UN-konferenco pri naturprotekto asertis en deklaracio la sekvajn: „La racia planado estas tiu baza rimedo, per kiu ni povas egaligi la plej diversajn konfliktojn inter la bezonoj de la disvolvado kaj de nia devo: ŝirmi kaj plibonigi la homan medion."

Konklude ni povas aserti, ke tute ne estas necesaj neripareblaj kolizioj inter civilizacio kaj naturmedio. Eblas ja krei – laŭ analogio de la naturaj memregulantaj eko-sistemoj – tiajn teknikajn sistemojn, kiuj ekvilibrigas la „memregulantajn", „influantajn" kaj „artefaritajn" eko-sistemojn, prezentas la bezonatan produktadon, konvenan prosperon kaj samtempe sekurecon por la homa medio.

La baseno de Tata, kiel kompleksa modelo por medioprotekto

Laŭ la supraj principoj estis kreita en la baseno de Tata (okcidente de Budapeŝto) vera model-teritorio por kompleksa medioprotektado. La baza ideo estas, ke malhelpi damaĝojn, ĉesigi ties fontojn, kaj tiamaniere plibonigi la medion, mastrumi la naturtrezorojn, efektiveblas nur tiam, se oni akordigas la sociajn kaj la ekonomiajn bezonojn. Tio signifas – sisteme orientante lokigon de produktofortoj – disvolvi urbanizadon, celante taŭgan utiligon de landaj kaj lokaj financoj kaj rezervoj – tiel, ke la tuta prospero de la teritorio estu en akordo kun la ekologiaj bezonoj. Alivorte, la celo: tiamaniere disvolvi la artefaritan medion, ke samtempe estu plejeble protektata la natura medio.



Moderna kloakakvo-purigejo en la teritorio

La donitaĵoj de la regiono, ankaŭ la antaŭe komencitaj tiudirektaj agadoj kaj ties rezultoj prezentis la motivon elekti la basenon de Tata kiel model-teritorion por medioprotekto. Ties „limojn" oni determinis surbaze de kompleksa analizo koncerne la bazajn elementojn kaj kreivajn faktorojn de la pejzaĝo. Multflankaj sciencaj kaj praktikaj studoj fare de fakaj instancoj kaj institucioj, de surloke agantaj scienculoj, pruvis la elstaran taŭgecon de la teritorio por kompleksa medioprotekta agado.

Tie montriĝis favoraj donitaĵoj el medioprotekta vidpunkto:

- la okazintaj morfologiaj ŝanĝoj en la pejzaĝo,
- la naturaj faktoroj,
- la faktoroj de la ekonomia disvolvo,
- la demografiaj faktoroj kaj la loĝateco,
- la tn. infrastrukturo.

Aparte grava avantaĝo ŝajnis, ke en tiu relative ne-granda teritorio estas facile superrigardi la realan kaj vivan komplekson de procezoj dum iom da pasinto kaj antaŭvidebla futuro.

Sur tiu ne-granda model-teritorio tre facile kaj klare studeblas konkreta regiono de la civilizacio, karakterizata de specifa urbanizado, ankaŭ tiagrada koncentriĝo de produktofortoj, kiu ekigis gravajn diferencojn dise en la teritorio. Krom la laŭloke diversa produktado kaj ties volumeno, precipe la infrastrukturo prezentas daŭran kaj konstantan altirforton, kiu signife „tuŝas" la ĉirkaŭaĵon.

Ĉi tie estas studeblaj – kun ĉiuj interligoj kaj interefikoj – la efektoj de popolmoviĝoj, same amasiĝoj, rapida evoluo de urboj, la tiel trudiĝintaj ŝanĝoj de la administrado, la moderniĝoj, la popoldensiĝon (aglomeriĝon) sekvanta transformiĝo de la socia kaj natura medio, k.a. Ĉion ĉi bonege ebligas analizi tiu model-teritorio laŭ pluraj vidpunktoj: socie-ekonomie, tempe kaj loke.

Pro tiaj avantaĝoj, dum la lastaj jaroj multe da hungaraj kaj eksterlandaj scienculoj, diversaj fakcelaj komisionoj kaj delegitaroj studis la fenomenojn kaj rezultojn en tiu model-teritorio. Studentoj de universitatoj kaj altlernejoj akiris konvenan idearon pri medioprotektado pere de la tie organizitaj studoj kaj konsultadoj. Sekve enlande kaj internacie jam vaste utiliĝis tiu modelo. La efektivaj rezultoj de naturprotekto, kune kun la gvidideoj kaj perspektivaj celoj, iĝis internacie rekonataj.

Pri la model-teritorio

La areon en la baseno de Tata sume 679 km^2 da surfaco ĉirkaŭas Danubo kaj finmontetoj de montaroj Vértes

kaj Gerecse (gereĉe). La akvokolektejo ampleksas 521 km^2, kaj la denseco de la natura akvoreto estas 1 km/km^2. La kultivita tereno atingas 46%, la industria kaj loĝata tereno 20%, arbaro 32%, akvoj, marĉoj 2%. Erozio minacas 74%-jn de la agroj. La reliefo de la baseno estas varia, sed la geologiaj kaj hidrogeologiaj cirkonstancoj estas aparte rimarkindaj.

entute 74 km longe. Aliajn fluojn en longo de 415 km prizorgas loka kompanio, same ĩa instalaĵojn por agroprotekto. Entreprenoj, kooperativoj prizorgas siavice 119 km longajn fluetojn.

La baseno de Tata enhavas 17 loĝlokojn – 3 urbojn kaj 14 vilaĝojn –, la popoldenseco atingas la duoblon de la landa, kaj elstare



Malagrablaj sekvoj de erozio

Ĉiuj fluoj fine atingas Danubon, inter ili la plej grava, *Általér*, kun 50 km longo. La jara trafluo estas ĉ. 20 milionoj m^3, kiun pere de inundon preventaj rezervujoj utiligas pluraj ripozejoj, sportejoj, akvoproviziloj industriaj kaj agrikulturaj.

La Nord-Transdanubia Hidrologia Direkcio zorgas ankaŭ pri pluraj fluoj,

altas la industria produktado popersona. Kvankam la cirkonstancoj ne favoras la agrikulturon en la baseno, tamen la produktaĵoj superas la landan meznombron. La industrio ekprosperis surbaze de minaĵoj – brunkarbo kaj konstrumaterialoj –, krome pro favoraj geografiaj situacioj (Danubo; dumvoje inter Budapeŝto kaj Vieno). Sed ĝuste la morfologiaj cirkonstancoj, kiuj prezentas daŭran bazon por la industrio, malhelpas en la valoj la agrikulturon, ties ampleksigon, kaj el tio rezultis specifa aglomeriĝo de la loĝantaro.

Pro la favoraj geografiaj cirkonstancoj ankaŭ la homan rason antaŭantaj prahomoj ekloĝis tie. Dum la jarmiloj sekve de la homa agado la pejzaĝo transformiĝis, precipe en la modernaj tempoj, pro la industrio, minado, kresko de la agrikultura produktado, kaj eĉ pli, pro la rapida urbanizado. Kompreneble la ŝanĝoj kunportis krom la pozitivajn rezultojn ankaŭ damaĝojn. Pri tiuj ŝanĝoj kaj damaĝoj jam depost 50 jaroj kontinue daŭras ĉe Tata profundaj kaj vastaj esploroj, kaj estis registritaj la plej diversaj indikoj.

Estas inde mencii, ke jam en la tridekaj jaroj per tutmonde unika, kompleksa ekzameno estis prilaboritaj en regiono de Tata la sociaj cirkonstancoj. Ĝuste tial oni elektis la regionon esplorcele, ĉar ĝi montriĝis laŭ multaj vidpunktoj kvazaŭ meznivela regiono en Hungarlando, do karakteriza, sen ekstremoj – tial oni povis ĝeneraligi la rezultojn por la lando. Tie ĉi estis kunmetitaj ankaŭ la unuaj detalaj mapoj pri la agraj grundoj, kaj tie estis instalita la plej densa reto por mezuri la precipitaĵojn.

Rekultivinda areo

La prosperanta ekonomio kaj la medioprotekto

Agrikulturaj entreprenoj okupas grandan parton de la tuta teritorio. Tamen la geografiaj ecoj ne tre konvenas por agrikulturo. Dum la antaŭaj jardekoj la kreskinta erozio kaŭzis sur la kampoj gravajn damaĝojn, kies sekvoj jam minace prezentiĝis eĉ ĉe la loĝlokoj.

La eroziaj damaĝoj malhelpis la ekonomian disvolvon, kaj ankaŭ paralele akcele kreskis mediaj damaĝoj, precipe en la akvoj. Dum la lastaj du jardekoj en multaj agrikulturaj entreprenoj – precipe en

ŝtataj bienoj – oni inaŭguris intensan koncentrigon kaj specialigon. Unue por bredado de kortobirdoj, poste por porko- kaj bovo-bredado, pli poste tio etendiĝis ankaŭ al kelkaj branĉoj de la agrokulturo. Granda produktiveco atingeblas nur helpe de komuna uzo de pluraj faktoroj – i.a. kemizado, maŝinaro, irigacio, fermitaj teknologiaj sistemoj. Sed tiel kreskas ankaŭ la danĝero pro engrundiĝo de kemiaĵoj: tiuj povas akumuliĝi, dise restas toksaj materialoj, poluciiĝas la akvoj surtere kaj subgrunde ktp.

Pro forta disvolvo de la industrio ĉirkaŭ Tatabánya abrupte kaj akcele kreskis tra la tuta baseno diversaj rubmontetoj, skorio-amasoj, ĉion kovrantaj industriaj polvoj, unuvorte: la kemiaj poluciaĵoj. Kreskis do la danĝero, ankaŭ tial, ĉar ĉiaj defalaĵoj pere de ventoj, aŭ per disfluado de pluvakvo polucias akvojn, kampojn, loĝatajn teritoriojn. Sekve la proksimaj agroj kemie difektiĝas, la grundakvoj ricevas venenajn efikojn, kaj fine, la vegetaĵa produkto montras grandajn damaĝojn. Krom tiuj, ankaŭ la vastiĝo de la loĝkvartaloj pliigas plurmaniere la mediajn damaĝojn.

Formi la estonton

Detaloj de la agrikultura kaj industria agado forte influas la medioprotektadon. La konvena ekvilibro en la baseno kompreneble dependas de la manieroj de ties efektivigo. Tiurilate tre gravas la agadoj de lokaj administraj centroj, de la mikrorajonoj kiel areoj de la teritorio, ĉar trarigardi la medioprotektadon kaj teritorio-disvolvadon, ekzameni la rezultojn kaj interligojn de la tiucelaj praktikaj agoj, eblas nur enkadre de tiuj etaj unuoj, areoj. Same, prefere tie estas ekzamenindaj la esploroj kaj eksperimentoj por akordigi interesojn de la ekonomiaj branĉoj kun la lokaj interesoj. Jen specialaj taskoj en planado, realigo, ankaŭ en organizado.

Iĝas pli bone konataj la interrilatoj en la teritoria strukturo, kio



Lago Öregtó ĉe Tata

ebligas krei novajn variantojn, do kontinue planadi. Tiel eblas optimume organizi la medioprotektadon ĉe la loĝlokoj ankaŭ laŭ vidpunktoj de prizorgado kaj funkcigo.

Estas rimarkinda la ĝustigo de pli fruaj, apenaŭ utilaj metodoj. Estis bedaŭrinde ofta praktiko, ke la teritoria planado diktis la direktojn de la ekonomia disvolvo, neglektante la donitaĵojn de la medio. El tio sekvis diversaj farendoj por reĝustigi, korekti; la antaŭe farita plano do fiaskis. Oni ne devis miri, se tiu posta protektado plej ofte montriĝis pli multekosta ol la preventa medioprotekto.

La pli moderna kaj racia planado, uzata en la model-teritorio, unue mezuras kaj kalkulas por multe da informoj: kiom da polucio estas atendebla en certa ekologia unuo de la teritorio? Ĉe la tie funkciantaj uzinoj – senescepte – oni kalkulas la poluciaĵojn devenan-

Post reordigo de erozio-zono: nova plantaĵo de vinberujo



tajn de la plej novicaj materialoj. La rezultoj prezentas bazon *por decidi* pri farendaĵoj de la medioprotekto, pri permeseblo de poluciantaj uzinoj, pri aplikeblo de agrikulturaj teknologioj, ekz. pri limigoj koncerne uzadon de kemiaĵoj.

ekonomia kaj demografia disvolviĝo. Pere de tiaspeca komputila modelo eblas taksi la produktotan aerpolucion, ekzemple la kvanton de sulfurdioksido, karbona monooksido, nitrogenaj oksidoj kaj polvoj, kaj same tion de la akvon po-

Fiŝkapto en rejunigita lago



Naĝejo en la bela naturo

Por prilabori la amason de multspecaj indikoj, oni uzas komputilon. Tiamaniere eblas prezenti, kiel ŝanĝiĝos la plej diversaj fenomenoj, inter ili la kvanto de la poluciaj materialoj, en la areo, laŭ la plua luciantaj fosforo, nitrogeno k.a. La taŭga prevento nepre bezonas tiujn fidindajn antaŭkalkulojn, kiujn tiu ĉi modelo disponigas al la instancoj por uzi ilin en la direktado, en la kompleksa planado.

Ĝisnunaj rezultoj

Pro la tre ampleksa polucio atinganta la basenon aŭ devenanta de tie, en la lastaj jaroj estis deciditaj gravaj disponoj. Ni rigardu ilin laŭvice.

Por igi *la aeron* laŭgrade pli pura en la baseno de Tata, oni prilaboris planon kiu laŭ teritoriaj unuoj precizigas la farendojn, surbaze de nunaj indikoj pri aerpolucio. Malnovaj fabrikoj modernigeblaj por malpliigi ilian poluciadon, estas laŭgrade likvidataj. Okaze de kreotaj novaj uzinoj, la instancoj, antaŭ ol doni oficialan permeson, postulas instalon de aerpolucion malhelpantaj aparatoj. Al la industriaj uzinoj oni ĉiujare difinas la permesitajn limojn de la eligeblaj poluciaĵoj; la tiujn transpaŝantaj entreprenoj devas monpunon pagi. El la tiel amasiĝantaj financoj oni subvencios investaĵojn por malhelpi aerpolucion. Efektive, helpe de tiu fonduso oni jam abunde ĉesigis fontojn de aerpolucio.

Vera progreso okazis sur la model-teritorio dum la lastaj jaroj ankaŭ koncerne la protekton de akvokvalito. Antaŭ 15 jaroj oni komencis realigi planon pri la lago *Öreg-tó* ĉe Tata, por rebonigi ĝian akvon. Nun la lago estas denove konvena por ripozado, refreŝiĝo kaj sportoj. La kvanto de mineralaj svebaĵoj en la enfluanta rivero *Által-ér* jam de jaroj restas akceptebla, sekve de efika funkciado de la instalita sedimentejo.

Por malhelpi la maljuniĝon de la lago, oni devis malpliigi la volumenon de kloakakvo enfluanta en la riveron *Által-ér*. Tiucele oni aliloken kondukis la ĝis tiam rekte enfluintajn kloakakvojn; aldone la centra purigejo de urbo Tatabánya estis pliampleksigita, tiu de urbo Oroszlány rekonstruita, kaj aparta purigejo estas konstruita ĉe buĉejo de granda agrikultura entrepreno (Környe). La atento nun turniĝis al la vegetaĵon nutrantaj materialoj, kiuj akcelas la maljuniĝon de la lago. Multe helpus, se oni sukcesos

Savindaj naturbelaĵoj

tiajn materialojn reteni antaŭ la lago. Apud la Nord-Transdanubia Hidrologia Direkcio ankaŭ Departementa Stacio de Sanitaro kaj Epidemiologio partoprenas en la kontrolado kaj konsultado pri la akvoprotektado, ne nur tie ĉi, sed ankaŭ en la tuta teritorio.

La protekton de la *grundo* – bremsante la erozion – celas kompleksaj planoj rilate la tutan basenon. La okazintaj rebonigaj intervenoj favore efikas al la cirkonstancoj: pli favoraj defluoj, bone grunden penetranta precipitaĵo kaj pli ensorbema vegetaĵaro kaŭzis, ke:

– malpliiĝis la grundo-pereo, la ellaviĝo de kemiaĵoj;

– la nesufiĉo de precipitaĵo malpli malutilas,

– la mikroklimato iĝis pli favora,

– kreskis la kapablo alligi karbo-

Ekologia ekvilibro bezonas ankaŭ birdojn!

nan dioksidon, aligi oksigenon.

La grundoprotekton bone servis rekultivado de la areoj, detruitaj de la industrio kaj minado. Tiucele estis plantitaj arbaroj, parkoj, kreitaj sportejoj aŭ fiŝbredaj lagoj, kie denove komenciĝis la vegetado, favore al la homa medio.

La plej favoraj natur-areoj, foje certaj natur-objektoj ricevis ĝenerale jam oficialan protekton. Internacie gravan valoron havas la loĝloko de la „antaŭ-homo" ĉe *Vértesszőllős,* krome la geologia esplorejo ĉe Tata. Ankaŭ tre maloftaj specioj de animaloj kaj plantoj ricevis oficialan protekton. Preskaŭ 25 hektaron okupas la fama pinglarbaro ĉe *Agostyán,* kie vivas 380 specioj de koniferoj (pinglarboj). Du „protektataj regionetoj" etendiĝas kelkloke en la basenon, pri ili necesas aparta zorgo flanke de la instancoj. Al ĉiuj ĉi estas inde mencii ankaŭ la relative ampleksajn park-arbarojn, kreitajn en la baseno favore al la promeni kaj ripozi ŝatantoj. Elvidejoj kun bela panoramo, arbaraj ripozejoj kaj sportejoj, gimnastikejoj kompletigas la plezurdonajn eblecojn. La baseno de Tata ricevas do daŭre altnivelan, *sisteman prizorgon.*

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

El la sekretoj de la magia kubo...

Se iu jam prenis en siajn manojn magian kubon kaj provis deturni ĝiajn tavolojn, eble post kelkaj paŝoj spertis, kiel rapide konfuziĝas la kubelementoj kaj preskaŭ estas neebla la restarigo de la origina situo.

Ni intencas doni praktikajn konsilojn al homoj, kiuj luktas – preskaŭ senespere – por solvi la problemon, kiel do returni la tavolojn kaj akiri ses flankojn de la kubo, laŭ koloro homogenajn.

Por la preciza komprenebleco ni devas difini kelkajn nociojn kaj krei mallongigitajn signojn.

Nomu la flankojn de la kubo jene: (nature ni komprenas fiksitan kubo-situon)



Fig. 1.



Fig. 2.

La kubo konsistas el sekvaj partoj: (konsiderante la diversajn moveblecojn)



Fig. 3.



Fig. 4.



Fig. 5.

Pri la tavoloj: nature ili estas kunmetitaj el angulaj, eĝaj kaj centraj kuberoj. La deturno-direkton de iu konkreta tavolo ni konsideras ĉiam „vid-al-vide", en la fiksita situo de la kubo mem, signite laŭ la marŝdirekto de la horloĝmontriloj:

La inversan direkton signas apostrofo, sed la egalan – nenio. Temas nur pri kvaroncirkla (90°) deturno. La duoblan kvaroncirklan (180°) deturnon signas la kvadrato, ekzemple:

F^2 = fronta tavolo estas duoble deturnita, kvaroncirkle. Ĉi-rilate ne havas signifon la direkto, ja la rezulto estas la sama.



Fig. 6.

Estas moveblaj la tri mezaj tavoloj:



Fig. 7.



Fig. 8.



Fig. 9.

Por la deturno de paralelaj tavoloj samtempe:



Fig. 10.



Fig. 11.



Fig. 12.

Por la deturno de la kubo mem: (ni povas konsideri, kiel tri apudajn tavolojn, deturnitajn samtempe)



Fig. 13.



Fig. 14.



Fig. 15.

Post tiuj difinoj, uzante la mallongigojn ni plenumas la solvendan taskon: el ajna miksita situo rearanĝi la ses unuope diverskolorajn flankojn. Nia metodo estas konata en „kubo-rondoj" kiel: „plenumo laŭ tavoloj".

1a paŝo: konstruado de la supra tavolo/flanko.

Por ordigi la supran tavolon, ni ne donas detalan priskribon, ja post kelkaj provoj pri ĝi facile sukcesos iu ajn. Tamen ni atentigas, ke la 1a paŝo tiam estas plenumita, se la supra tavolo, kaj eĉ ĝiaj kvar vertikalaj flankoj estas laŭkolore en konvena ordo, krome ĝiaj eĝaj kuberoj identas kun la samkoloraj centraj kubelementoj:


Fig. 16.

2a paŝo: konstruado de S_m tavolo.

Deturnante la malsupran tavolon ni serĉas eĝan kuberon, kies vid-al-vida flanka koloro identas kun la – super ĝi situanta – centra kubelemento, eĉ, tiu ĉi eĝo havas tian alian flankon, kies koloro estas identa al la centra, trovebla aŭ en dekstra, aŭ en maldekstra flanko:

./ en maldekstra flanko
MS MD MS' MD' MS' F' MS F

./ en dekstra flanko:
MS' D' MS D MS F MS' F'



Fig.17.

Rimarko: en malfeliĉa kazo povas esti, ke ne troveblas „taŭga" eĝa kubero – tiuokaze oni devas fari unu el la donitaj operacioj. La 2an paŝon ni devas ripeti ĝis la plena meza tavolo estas ordigita.

3a paŝo: ĝustlokigo de angulaj kuberoj en la malsupra tavolo:

(ankoraŭ ne inkluzivante la finan returnigon de la angulelementoj). Kiel estas evidente, tri centroj difinas la ĝustan lokon de iu angulo. Ĉar restis entute kvar anguloj, facile estas kompreneble, ke deturnante la malsupran tavolon, ĉiam estas akirebla la „bona" situo almenaŭ de du anguloj, troveblaj aŭ unu apud la alia, aŭ en kontraŭa situo. Se vi faras tion:



Fig.17.1

D MS D MS F MS^2 F' MS' D' MS D – tiuokaze ŝanĝas lokojn la du angulelementoj, troveblaj en la sekco de maldekstra kaj malsupra flankoj. Tiun operacion vi devas duoble plenumi, se du anguloj estas kontraŭe.

4a paŝo: deturno de angulaj kubelementoj en ĝustan situon.

La angulaj kuberoj en la malsupra tavolo jam estas ja ĝustloke, sed iliaj flanketoj laŭ koloro ne konformas al la konvena centro. Per la sekva operacio vi povas deturni tri angulojn, ĝis la kvara restas senŝanĝe:



Fig. 18.

D' MS^2 D MS D' MS D

laŭ la sekva metodo estas turnebla du anguloj tiel, ke du aliaj restas senŝanĝe:

D' MS^2 D MS D' MS D
MD MS^2 MD' MD MS' MD'

Tiujn ĉi du operaciojn uzante laŭ neceso, certe ĉiu angulelemento baldaŭ estos en ĝusta situo.



Fig. 19.

5a paŝo: ĝustlokigo de la eĝaj kuberoj.

Por plenumi tiun taskon faru D_k paŝon. (dekstra kubturno, egale laŭ horloĝa direkto.)

Tiel estos vid-al-vide, kiel nova fronta flanko – la originale malsupra flanko. En malofta okazo estas videbla la sekva aranĝo de kubelementoj:



Fig. 20

t.e. – ĉiuj eĝoj estas en malordo

Ĉi-kaze, post D'_k , faru la sekvan metodon:

D'_m MS D_m MS D'_m MS D_m MS D'_m MS D_m

Vi devas ricevi per tiu metodo (se necesas – dufoje aplikinte ĝin) tiaspecan malsupran flankon, kiu havas du eĝo-flankon en malordo.



Fig. 21.



Fig.22.

Por la plulaboro tenu la kubon, vidante la malsupran flankon kiel frontan kaj uzante frontan kubturnon (F_k) laŭ aŭ Fig.21 aŭ Fig.22 laŭplaĉe, ĉar la sekvaj du operacioj diversas nur laŭ direkto:

1. D'_k D'_m MS' D_m MS^2 D'_m MS' D_m

2. D'_k D'_m MS D_m MS^2 D'_m MS D_m

Post tiu vi trovas en ordo la malsupran flankon. Uzante supran kubturnon (S_k) vi trovas ankoraŭ unu flankon en ordo, do kalkulante ankaŭ la pretan de komence supran flankon – vi jam havas entute tri pretajn flankojn. Por la fina operacio vi devas fari unu S_k-n, do turni la kubon ĉirkaŭ ĝia vertikala akso ĝis la preta flanko iĝos malfronta. Tenante la kubon en tiu situo vi povas vidi la sekvan frontan flankon:



Fig. 23.

Vi devas konstati, ĉu la dekstra (2.) aŭ la maldekstra (1.) flanko-centro havas tian koloron, kian montras la signita eĝo-flanketo. La du metodoj estas sekvaj: (ili diversas nature nur laŭ direkto)

1. D'_m MS^2 D_m MS D'_m MS^2 D_m MS D'_m MS^2 D_m

2. D'_m MS^2 D_m MS' D'_m MS^2 D_m MS' D'_m MS^2 D_m

Ĉi tie la plenumo estas preta. La aŭtoroj de tiu ĉi artikolo ne estas tre lertaj kaj pretaj ĉi-rilate, tamen per la skribita metodo dum ĉ. 3 minutoj solvas tiun taskon.

Certe ekzistas pli rapidaj metodoj, ja la rekordo pri la plenumo nuntempe jam estas mezurebla per sekundoj.

Por facile memorigi la montritajn formulojn, estas uzataj inter la kubo-turnantoj tiuspecaj „rememorigaj frazoj".

Por plifaciligi la lernadon ankaŭ por niaj esperantistaj kubo-ludantoj, ni proponas la sekvan sistemon:

Se la turno estas kvaroncirkla, laŭ horloĝo: egale (e)
kontraŭ horloĝo: inverse (i)
duoncirkla, t.e. duobla 90°: (u)

Tabelo por deturnoj

Flankoj				**signoj kaj vortetoj**	
	F/*fe*/	MF/*mef*/	S/*se*/	MS/*mes*/	D/*de*/	MD/*med*/
	F'/*fi*/	MF'/*mif*/	S'/*si*/	MS'/*mis*/	D'/*di*/	MD'/*mid*/
	F^2/*fu*/	MF^2/*muf*/	S^2/*su*/	MS^2/*mus*/	D^2/*du*/	MD^2/*mud*/
Mezaj tavoloj	F_m /*fem*/		S_m /*sem*/		D_m /*dem*/	
	F'_m /*fim*/		S'_m /*sim*/		D'_m /*dim*/	
	F^2_m /*fum*/		S^2_m /*sum*/		D^2_m /*dum*/	
Paralelaj tavoloj	F_p /*fep*/		S_p /*sep*/		D_p /*dep*/	
	F'_p /*fip*/		S'_p /*sip*/		D'_p /*dip*/	
	F^2_p /*fup*/		S^2_p /*sup*/		D^2_p /*dup*/	
Kubo-deturno	F_k /*fek*/		S_k /*sek*/		D_k /*dek*/	
	F'_k /*fik*/		S'_k /*sik*/		D'_k /*dik*/	
	F^2_k /*fuk*/		S^2_k /*suk*/		D^2_k /*duk*/	

Vidu ekzemple la 2-an paŝon de nia metodo, per supraj vortetoj:
MS MD MS' MD' F' MS F
(mes–med–mis–mid mis–fi–mes–fe)
Eble tiu „frazo" aspektas pli facile memorebla, ol la pura formulo mem. Ĉu ne?
Fine por homoj, kiuj volas iom plue sperti la eblojn kaŝitajn en la kubo, ni aldonas plenumi kaj primiri kelkajn formulojn:

(la komenca situo ĉiam estas la plenumita kubo, t.e. la rezulto de la de ni prezentita metodo)

1. $D^2\ F^2\ D^2\ F^2\ D^2\ F^2$ t.e. $(D^2\ F^2)^3$ (du-fu trioble)
2. $(D^2\ F^2\ MF^2)^2$ (du-fu-muf duoble)
3. $(D^2\ F^2)^3\ S^2_k\ (D^2\ F^2)^3$ (du-fu trioble, suk, du-fu trioble)
4. $(D^2\ F^2)^3\ S^2_k\ (D^2\ F^2)^3\ D_k\ (D^2\ F^2)^3\ S^2_k\ (D^2\ F^2)^3$
5. $(D^2\ F^2)^3\ S^2_k\ (D^2\ F^2)^3\ D_k\ (D^2\ F^2)^3\ S^2_k\ (D^2\ F^2)^3\ F_k\ (D^2\ F^2)^3\ S^2_k\ (D^2\ F^2)^3$

Sed, se vi volas pli rapide akiri la saman rezulton ol laŭ la 5-a formulo, do faru sekve: (6-a formulo)

6. $D^2\ MD^2\ F^2\ MF^2\ F_k\ D^2\ MD^2$
(du-mud-fu-muf fek du-mud)

7. $D^2\ MD^2\ MS\ D^2\ MD^2\ S^2\ D^2\ MD^2\ MS\ D^2\ MD^2$
(du-mud mes du-mud su du-mud mes du-mud)

8. $D'_p\ D_k\ MS')^4\ (D'_p\ D_k\ MS)^4$
(dip-dek-mis kvaroble, dip-dek-mes kvaroble)

aŭ tute la sama rezulto, sed pli simple:
$(D'_m\ MS')^4\ (D'_m\ MS)^4$ (dim-mis kvaroble, dim-mes kvaroble)

János *Doktor* – Dénes *Fiatal*

GAJA PAĜO

Malfeliĉa junedzino

La hejmenvenanta edzo rimarkas, ke la juna edzineto pakas kofron.
– Mi reiros al mia panjo – ŝi klarigas.
– Sed kial, mia koreto? Ni ankoraŭ neniam kverelis, kio do?
– Vi pravas, sed mi estas ĉiam nervoza pro mia malordemo, kaj tute ne plaĉas al mi kion mi kuiras...

Feliĉa aktoro

– Kiam mi finis la grandan monologon kaj falis la kurteno, la publiko ekaplaŭdis freneze – fieras la memkontenta aktoro.
– Grandioze, amiko! Ĉu vere tiel bela estas la kurteno de via teatro?

Feliĉa homo

– Hodiaŭ mi rigardis en la spegulon. Kiel maljuniĝis tiu spegulo!

Konsilo por esti feliĉa

– Fojfoje, laŭokaze, mi montras min iom stulta – diris la orienta saĝulo – tiel mi akiras pli da simpatio inter la homoj.

Duba feliĉo...

– Sed kara mia filineto, tamen, ne kondutu tiel kaprice! Kion vi faros, se vi havos infanon?
– Mi havas jam, paĉjo...

Ekzistas feliĉaj edzinoj

– Ĉu bone sukcesis via edziĝo, Rajmundo?
– Jes, ja, tamen daŭre turniĝas iu pens' en mia mens'...
– Kio do?
– Mia edzino pli feliĉe edziniĝis, ol mi edziĝis...

Kaj jen: feliĉa fianĉo

– Do sinjoro, vi volas denove edziĝi, kvankam vi aĝas 70 jarojn, kaj via fianĉino ĵus atingis la 18-an!
– Mi persistas ĉe miaj kutimoj. Kiam mi ligiĝis al mia unua edzino, tiam ankaŭ ŝi havis nur 18 jarojn.

La feliĉo foje malfruas

Ineto sola ĝuas la sunbrilon sur la benko, kiam junulo haltas tie, kaj sidiĝas sur la sama benko. La preterpasanta policano suspekteme rigardas la junulon, poste turnas sin al la virino:
– Ĉu vi bezonas mian helpon? Ĉu ne molestis vin tiu viro?
– Ankoraŭ ne, vi povas iri trankvile. Eble baldaŭ li ekkuraĝos...

Szilárd Bálint

Sub la turka jugo

En la pasinta jaro, kiam la bulgara popolo festis la 1300-an datrevenon de la bulgara ŝtato, mi vojaĝis al Varna. En Sofio venis en la kupeon alta sinjorino, kiu sur la brusto portis verdan kvinpintan stelon. Ŝi salutis min bulgare, sed mi respondis al ŝi Esperantlingve. Tiam ŝi surpriziĝis, kaj kun granda ĝojo sin prezentis: „Mia nomo estas Bojana Prodanova, emerita profesorino, mi loĝas en Gabrovo." Nur duope ni estis en la kupeo, kaj amikeme interparolis pri la 13-jarcenta historio de Bulgario. Post nelonga tempo ŝi diris, ke preskaŭ en ĉiu familio estis herooj dum la pasintaj jarcentoj, kaj se mi konsentas, ŝi volonte rakontas la epopeon de siaj prauloj. Jen la historio:

Dum la somero de jaro 1832, en la malgranda urbo Kalofer, en la Rozavalo, sub la plej alta pinto de montaro Balkan naskiĝis filo en la familio de Stojno Bozukov. La nomo de la filo estis Genko, kiu estis malsana, plorema kaj iĝis lama. Tio ĉi ĝenis lin dum ludado kun la najbaraj infanoj, tial li prefere aŭskultis la fabelojn de sia avino kaj muzikis per guzlo aŭ sakfluto.

Kiam Genko iĝis 17-jara junulo, kune kun sia patro li komencis viziti najbarajn vilaĝojn por aĉeti bovojn kaj bovidojn de la paŝtistoj en Kalofera Balkan-montaro. Li ĝuis la vidaĵojn, la flutadon de la paŝtistoj per ŝalmoj, kaj li mem rapide perfektiĝis pri la ludo per ŝalmo. Ofte emociigis lin rakontoj de la paŝtistoj pri periodoj de pesto, pri arbaraj nimfoj, pri fondo de urbo Kalofer, kaj pri la „hajdukoj", defendantoj de la sklavigita popolo.

Aŭtune la patro kaj Genko kondukis la brutaron en Istambulon al riĉaj bulgaraj komercistoj, kiuj vendis la bovaron al la turka armeo. En Istambulo la patro kaj filo ripozis kelkajn tagojn, ili interparolis kun tieaj bulgaroj pri la nesekura stato de la popolo, kaj poste ili reveturis al Kalofer.

Post kvar jaroj Genko iĝis granda, larĝŝultra, bela brunhara junulo. Kvankam li estis malriĉa kaj lametanta, li ne forgesis la belan Todorkan, la junan filinon de Hristo Bacurov en Istambulo. Todorka ankaŭ enamiĝis al Genko, kiun ŝi ege ŝatis aŭskulti ŝalmon ludi. Post iom da hezito, Ĥristo Bacurov donis sian konsenton, kaj la familioj aranĝis edziĝfeston en Istambulo. La tieaj gepatroj ŝarĝis tri veturilojn per la doto, metis sur ŝian kolon kolierojn en ormoneroj, poste kun florbukedo, inter benoj, larmoj kaj admonoj al Genko por ami kaj brave protekti la junedzinon, ili adiaŭis la feliĉan paron.

Genko enkondukis la belan Todorkan en novan domon, konstruitan por ŝi kun penoj kaj amo. Tie ili feliĉe kunvivis. Venis la fileto Stojno, poste pluaj kvin filoj kaj unu filino.

Dum la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento, la vivo en Kalofer malfaciliĝis, la homoj ekmizeris. Etaj trupoj de la turka armeo, „kargalü kaj basiboznei" kaj aliaj, ofte invadis la vilaĝojn, ŝtelis ĉiujn valorajojn, eĉ la dombestojn. Malfaciliĝis la profesio de Genko. Li jam ne povis kolekti tiel grandan bovaron por Istambulo, kaj la vojaĝo tien estis jam nesekura. Li komencis forgesi la ludon per la mielvoĉa ŝalmo.

Kiam en jaro 1871 estis fondita revolucia komitato en Kalofer, Genko estis invitita tien, kaj oni komisiis lin esti kuriero. Li vizitis plu la vilaĝojn por aĉeti brutojn, do tie la turkoj alkutimiĝis vidi lin kun la bovoj, tial ne suspektis lin. Dum 1874 la rikolto estis malabunda, la brutaro amase ekstermiĝis. Jam la frua printempo de 1876 ekigis revolucian viglecon. Genko disportis alvokajn leterojn al la najbaraj vilaĝoj kaj urboj. La 20-an de aprilo la ribelo ekflamis. Kalofer mem ne ekribelis, ĉar ĝi havis grandparte turkan loĝantaron. Al la ribelo nur malmultaj bravaj patriotoj aliĝis, ĉar mankis larĝa subteno. La turka armeo kune kun la turka loĝantaro kruele murdis, bruligis kaj rabis ĉie, la kuraĝa rezistado de la ribeluloj ne povis sufiĉe helpi.

Tiam estis danĝere dum vojaĝo renkonti krueligitajn kaj fanatikigitajn turkojn, tamen Genko iris kun sia granda filo Stojno al najbaraj vilaĝoj por helpi la ribelulojn. Tiuj transdonis al li gravan leteron pri la situacio, en kiu ili petis senprokrastan subtenon. Genko kun timo enigis la leteron sub sian ĉemizon, kaj kun la filo ekiris al Kalofer, tiel rapide kiel ili kapablis. Ili jam trapasis la vilaĝon Miterizovo, kiam ili vidis kelkajn turkojn, „zabtieojn" – turkajn policistojn –, kiuj rapide sekvis ilin. Li kaj la filo jam proksimiĝis al la lasta pajlejo ĉe fino de la vilaĝo, kiam la policistoj laŭte kriegis malantaŭe: „Kapitulacu *komita*" (–ribelulo)!

Genko kaj Stojno haste eniris la pajlejon, kaj riglis la pordon. De tie estis eblo fuĝi al valeto, kiu kondukis al la montoj. La juna Stojno rapide ŝovis sin tra la mallarĝa fenestreto, teren saltis, kaj kun la letero kuregis al la arbaro. Genko penis per ĉiuj fortoj ankaŭ sin traŝovi tra la fenestreto, sed vane, li ne sukcesis. La policistoj jam frapis malpacience la pordon, kaj kriis: „Kapitulacu komita! ... Ni bruligos la pajlejon! "

Genko ne kapitulacis. Li esperis, ke Stojno alportos la leteron al la revoluciuloj, kaj li povas helpi la fuĝon de Stojno, se li ĉi tie rezistas al la turkoj. Tamen li ekploris, kiam li pensis pri la amataj Todorka kaj infanoj, kiuj vane atendos lin. Per laŭta voĉo li sendis benon al la familio, kaj atendante la faton, li fermis siajn okulojn.

Post la lasta averto la turkoj vere bruligis la pajlejon. Nubo de fumo penetris la pajlejon, flamoj krakis de ĉiuj flankoj. Akre pika fumo kaj terura doloro malheligis la konscion de Gen-

ko. Kiam la pajlejo forbrulis, kaj nur etan fumstrion ĝi eligis, la policistoj alproksimiĝis, kaj vidis karbiĝintan kadavron, kies unu kruro estis iomete pli longa ol la alia. Unu el ili ekkonis Genkon, kaj diris: „Ve al tiu kompatinda ribelulo! "

– Dume Stojno – mia avo – atingis sendanĝeran lokon en la arbaro, kiam... ho, mi petas pardonon, ni alvenis al Gornajovica, mi devas transvagoniĝi! – adiaŭis sinjorino Prodanova.

* *

Kara Leganto! La redakcio petas vian helpon por fini la historion, kiun ne povis daŭrigi s-ino Prodanova. Ni scivolas: kion faris Stojno post la rifuĝo, por kvitigi la kruelaĵojn? Bonvolu sendi ne pli ol 30 tajpitajn liniojn. La plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la teksto aperos en Hungara Vivo.
Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

DAŬRIGO

de la novelo „La fidela edzo"

aperinta en la n-ro 1981/1. Daŭrigas István Bálint el Kecskemét (Hungario)

La policoficiro vokis savistojn, kiuj portis la svenintan virinon, akompanatan de Karlo, al ambulanco. Tie la kuracisto rimarkis, ke ŝia malespera stato bezonas daŭran trankviligon, kiun homan taskon Karlo tuj akceptis. La sekvan tagon li proponis reveturi kune al la stacidomo, kie malaperis la fripono kun la nuptodonaco, por trovi almenaŭ liajn spurojn.

En la restoracio ili sukcesis trovi kelneron, kiu memoris pri la juna edzo, ankaŭ pri lia reveno en la lasta minuto por serĉi ian valizon, intertempe la vagonaro ekiris. Por priskribo de lia aspekto, ili ricevis informon de la fervoja kasistino. Tiu surprizite rimarkis, ke post ekiro de la trajno al Rimini la lipharulo aĉetis bileton al la kontraŭa direkto, ĝis Taranto, „tutcerte" – ŝi rememoris.

Ili telefonis pri la aŭditaj al la policejo en Taranto, poste ankaŭ al ŝiaj gepatroj en Milano, kiuj vokis hejmen la forlasitan edzineton. Ŝi jam trankviliĝis iomete, kaj rapide akceptis, ke Karlo akompanos ŝin... ĉar la malfidelan edzon ŝi jam ne bedaŭris. La perdita mono kaj la tial atendeblaj gravaj riproĉoj de la gepatroj multe pli ĉagrenis ŝin.

Dum la veturo Karlo klopodis forgesigi la okazintaĵojn, kaj turni ŝian atenton al la bela pejzaĝo. Li ankaŭ rakontis pri sia vivo, ne forgesante mencii, ke ankaŭ li havas kion forgesi, ĉar lian amatinon delogis ĝuste lia bona amiko. Ne mirinde do, ke la blondulino ekbedaŭris la simpatian viron. Nun jam unu konsolis la alian ĝis Milano. La gepatrojn baldaŭ trankviligis polica informo pri arestado de la fripono, trovita kun preskaŭ la tuta sumo. La fidelan akompanadon sekvis amo inter la gejunuloj kaj vera nuptovojaĝo – nun jam sen surprizoj.

DAŬRIGO

de la novelo „La heredaĵo"

aperinta en la n-ro 1981/3. Ni ricevis ĝin de Kurt Langer el Dresdeno (GDR) – kaj li la libropremion de ni.

La junulo decide respondis: „Mi forlasos vian domon tuj, sed antaŭe legu tiun ĉi dokumenton! " Sinjoro Berger petis sian filinon lasi ilin solaj, ĉar li vidis en la okuloj de la junulino, ke al ŝi tre malplaĉis la malmildaj riproĉoj de la patro.

Li eklegis la malnovan skribaĵon kaj paliĝis, dum minuto eĉ vorton apenaŭ trovis. Pardonon petante li akcentis: „Sed tio tute ŝanĝas la situacion! Do vi estas riĉa pro la heredita bieno, kaj neniel dotoĉasisto. Feliĉe ! Bonvolu do resti iomete en nia domo! " Kaj la gastigado daŭris plurajn tagojn, ĉar la du gejunuloj trovis multe da plezuro en la societo de la alia... Ormosi baldaŭ konfesis al Alica, ke li ekamis ŝin jam ĉe la unua vido, kaj multe li rakontis pri siaj lernejoj, profesiaj konoj kaj okazaj amuzoj. Mallonge dirite, li adiaŭis invitante s-ron Berger al la bieno, kie oni decidu jam pri la gefianĉiĝo.

S-ro Berger rapide kalkulis la situacion kaj siajn ŝancojn: kiel ajn finiĝos la policaj esploroj pri origino de lia kapitalo, pri la iam rustkovritaj ormoneroj – ja nenion oni pruvos kontraŭ li! – restus ĝena makulo sur li, la sekreta titolo de „ŝtelisto". Aliflanke la junulo, kiel bofilo, povus iam direkti ankaŭ la fabrikon. Kaj dum ilia vizito la aferoj bone ordiĝis, kaj Ormosi asertis al Berger, ke jam tute ne interesas lin la trezoroj de la malnova kapelo, nur la feliĉe trovita trezoro: la fianĉino!

Tiun historion mi legis en la vagono, ĝis kiam la komencanta nokto igis min fermi la libron, ĝuste ĉe la geedziĝo de la juna paro...

Ĉu aŭdeblas io interesa, doktoro?

Malplena vortaro

Ĉampano: furaĝo por ĉamoj
Ĉarpentisto: koĉero malgraŭ si
Hisopo: grupo por suprentiri flagojn
Kantalupo: muzikema rabobesto
Kateno: nomo de la greka ĉefurbo en la dialekto de malliberuloj
Mikrokoko: malgranda birdo, kiu ofte infektas
Murmuro: indigno de masonisto
Mustango: dancado de ronĝuloj, se ili ekvidas sovaĝan ĉevalon
Onono: atomo de kuracplantoj
Perono: kurtaĝo
Platano: ne montarano
Remaĉuloj: mallertaj boatistoj
Senila: ne kapabla **labori** pro maljuneco
Timbalo: danca amuziĝo por malkuraĝuloj

István *Takács*

Doktoro, probable vi preskribis por mia edzo troan dozon da trankviligaĵo!



recenzoj * recenzoj

Nova sulko

Sibuya Teisuke: Krias mi sur la kampo. Esperantigis: Yokota Manabu. 21 cm, 157 p. Publikigis: Kinugasa Hirosi, Yokohama.
Prezo: 40 steloj (1.000 jenoj)

Sibuya komencis verki jam kiel 17-jara junulo inter malfacilaj cirkonstancoj post la unua mondmilito. Li estis terkulturisto kaj laboris ŝvitade sur la kampo de frumateno ĝis vespero. La gepatroj estis malsanaj pro la trolaboro kaj nesufiĉa nutraĵo. La situacio de la kamparanoj estis mizera, ili vivis, pli ĝuste „funkciis" kiel rizproduktaj maŝinoj. Tio estis ankaŭ lia dividparto, sed li surprenis ĝin malmolnuke, kreskis, fortiĝis eĉ en insulto, humiligo, persekutado – kiel palmo sub la ŝarĝo. *„Se vi ne donas al mi insulton, persekutadon / senkonscie / ŝrumpas / mia animo."* Kompreneble li revadis pri nova, vera vivo, justa mondo, kiam „ni redonos al la subpremantoj, ekspluatantoj la *favoron,* kiam novan sulkon plugos la plugilo." Jes, li estas temperamenta, pasia revoluciulo, kaj ĉi tio determinas lian poezion.

Lia imitinda modelo estis Taras G. *Ŝevĉenko* (1814-1861), la konata, progresema ukraina verkisto, naskita kiel servutulo, kiu senĉese batalis por la servutul-emancipo. La aŭtoro dediĉis memore al li ĉi tiun libron. La unua japanlingva eldono aperis en 1926, kaj konsiderinde influis la kamparanan klason, eĉ aliulojn, ja tiu ĉi Krio postulis ĝeneralan, fundamentan demokratismon.

Kelkaj povas lanĉi la demandon: kiel oni taksu la libron, ĉu ĝi estas poemaro, aŭ io alia? Kompreneble ni ne konas la originalon, sed ĉe prozo-poemoj tio ne gravas. La tradukinto diras: „La originalo, laŭ la verkinto, bezonis ne la formon, nek teknikan lertecon de jam ekzistantaj poemoj, kaj tial por doni fidelan tradukon zorgis mi preskaŭ ne pri la rimo, sed pri la verso." La aŭtoro violonas sur unu kordo, li estas „unuflanka", li havas unu celon, lia poemaro estas nur rimedo por atingi la celon. *„Min premu tiom, kion vi deziras. / Ne ekburĝoni mi ne povas / ĉie ajn forte kiel herbaĉo / tiel longe mi vivas."*

En la tria dekado de nia jarcento estis la ekonomia situacio malfacila ĉie en la mondo, ankaŭ en Japanio. Sciante, ke la japana popolo estas prudenta, progresema, mi estas certa pri tio, ke la nuntempa situacio estas ankaŭ por la kamparanoj multe pli bona, kaj la Krio, la agado de la poeto ne estis vana, senrezulta.

Julio *Varga*

★★★

Post longa silento

Urbanová, Eli: El subaj fontoj. Poemaro. Literatura almanako de „Starto". Eld.: Ĉeha Esperanto-Asocio, Prago. 1981. 95 p. Prezo: 4,80 ned.gld. (Por Hungario: 30,- forintoj)

Unu sola guto entenas la guston de la maro kaj unu sola poemo respegulas la talenton de poeto. Ofte, nur de unu poemo, tralegita hazarde en iu ĵurnalo aŭ revuo, ni malkovras nian ŝatatan poeton. Tiel hazarde mi malkovris por mi mem Eli Urbanová-n. Ŝia poemo *Tuko*, kiu aperis en „25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj", impresis min per sia freŝa sento, originala poezia esprimmaniero, kaj tiu ĉi eta poemo instigis min pli detale ekkoni la kreadon de Urbanová. Ŝian nomon mi trovis en „Esperanta Antologio" (1957) kaj mi trafoliumis ŝian unuan poemkolekton „Nur tri koloroj", kiun mem Baghy honoris per sia antaŭparolo kaj kiun „Stafeto" eldonis en 1960. Pri „Nur tri koloroj" aperis favoraj recenzoj, sed pro nekonataj kialoj E. Urbanová longe silentis kaj nur en diversaj revuoj malofte, sporade aperis ŝiaj poemoj.

Kaj nun, post pli ol dudekjara silento, Ĉeha Esperanto-Asocio eldonis ŝian novan poemkolekton „El subaj fontoj". Kvazaŭ vere el subaj fontoj elfontas la novaj poemoj de la konata poetino. Ankaŭ en tiuj ĉi poemoj ni trovas la konkretajn detalojn kiuj karakterizis la fruajn poemojn de Urbanová, sed al tiuj ĉi detaloj la poetino donas novan, pli filozofian sencon. Tion bone pruvas la poemoj de la ciklo „Ringo", kie per ĉiutagaj objektoj Urbanová materialigas la sentojn kaj tiamaniere kunligas la konkretan materian mondon kun la abstrakta idea mondo. Ekzemple la ringo en la poemo *Ringo* esprimas riĉan gamon de sentoj kaj ĝi fariĝas la memoro, la doloro, la iama amo. La plena vazo de salikfloroj el la poemo *Pri unu printempo* fariĝas simbolo de la juneco, rido, belo. Por la poetino la „bruna, varma" jako el la poemo *Jako* restas unu sola jako en la mondo, ĉar:

„Lia jak' neforgesebla.
Ja en ĝi li donis al mi
ellasante certan daton
tutan universitaton
de amo..."

Urbanová spertas enpenetri la anguletojn de la nekonata ina animo. Poezie, delikate ŝi esprimas la eternan homan sopiron, ami kaj esti amata. Ŝia sincera voĉo donas al la poemoj intiman melodion.

Interesaj kaj originalaj estas la poemoj de la ciklo „Herooj de la zodiako". Delonge la homoj provas deĉifri la misterajn signojn de la zodiako kaj pere de la steloj ekkoni sian sorton. Per milda ironio kaj trafaj komparoj Urbanová priskribas la zodiakajn signojn, kaj tiuj ĉi dekdu poemoj estas etaj versportretoj de diversaj homaj karakteroj.

Urbanová estas poetino kiu sperte kreas mallongajn poemojn, en kiuj la sento estas natura kaj profunda. Tamen ŝiaj longaj poemoj ne estas sukcesaj. En ili la rakonta elemento paligas la poezian senton, kaj tiuj poemoj por mi similas pli al ritma prozo ol al poezio. Tia estas *Ombroj de la estinteco,* kiu tamen per multtavolaj asociaĵoj prezentas interesan eksperimenton en nia poezio. Tia estas la longa poemo *Imagu – tigroj!* kaj la poemoj el la ciklo *Triopo.*

Sed malgraŭ tiu ĉi rimarko, Urbanová estas tre atentinda suverena kreanto de la originala poezio, kies individua voĉo riĉigas kaj plezurigas ĉiun leganton.

Georgi *Mihalkov*

Arto kaj vivo

Thomas Mann: Tonio Kröger. Esperantigis: Ŝiger UJEKI. 18 cm. 90 p. Eldonis: Zamenhof-Klubo, Tokio. Prezo: 14,40 gld.

La komenco similas al malrapida fonto. Ekaperas lernanto Tonio Kröger, kaj liaj amikoj Hans, Ervin. Promenado, babilado. Kaj foje Ŝi: la blonda Inge. Tonio enamiĝis al ŝi. Li kutimis jam poemojn verki. Foje dum dancado de muelileto (dancformo) li ekfalis, ŝi kaj multaj priridis lin. Post morto de la patro la patrino ree edziniĝis, kaj ili translokiĝis al Italio, li dronis en volupton, kvankam esence li abomenis la dibocan vivon. Poste li translokiĝis al Munhheno, kie li konatiĝis kun pentristino Lisaweta, kun kiu li daŭrigis interesan interparoladon pri arto kaj vivo. Forlasinte Munhhenon li vojaĝis por viziti la iaman gepatran domon, poste sekvis Danio, baldaŭ Svedio. Tie en dancsalono de la hotelo li ekvidis Inge-n en kompanio de Hans, sed ili ne rimarkis lin. Dum dancado Inge kaj ŝia kavaliro falis (justodona providenca), li milde levis ŝin, iris for, kaj plorĝemis, trarigardis sian vivon: li staras inter du mondoj, kaj en neniu el ili li sentas sin hejme; skribis al Lisaweta: vi pravis, ke vi iam nomis min vojerarinta burĝo.

Thomas Mann estas unuaranga verkisto. Lia elstara stilo, kiu en ĉi novelo estas kvazaŭ lirika, delektas la leganton. La priskribo de la personoj kaj medio estas preskaŭ lacige preciza (en deklinia frazo), tamen interesa. La anim-analizo atingas **Dostojevskijan** profundon.

La centro, kerno de la libro konsistas en la pensoj pri arto kaj vivo (interparolado kun Lisaweta). Tonio jam frue rimarkis, ke „tiu, kiu amas plej multe, estas la venkito, kaj devas suferi", kaj tion ke „bonaj verkoj naskiĝas nur tra la premo de peniga vivo", kiel oni kutimas diri: sub ŝarĝo kreskas palmo. Kelkaj markonkoj dum doloro produktas perlon, se fajna polvero penetras inter la duran ŝelon kaj la molan korpon. Tonio, kiel poeto, laboris ne por vivi, sed vivis por labori. Li estas de kritika naturo. Facilanime li kritikis, eĉ devalutis aliajn verkistojn, poetojn. Kaj se li eventuale trovis iun bonan, li riproĉis lian ne senmakulan vivon (forgesante sian pli fruan vivmanieron), rigardis aĵojn, personojn tiel, kiel ili ne bezonas esti rigardataj. Li malatentis, ke ne ekzistas ĉiurilate komplete perfekta homo; talento kaj senmoralo kelkfoje aperas kune; nur unusolan homon ni menciu: Villon. Tamen la bona beletro estas vojo al kompreno, pardono, amo, kaj liberigas la menson, penson, senton. Nia poeto amis la vivon, sed povis nur malfacile *ŝati* la vivantojn. Li ne trovis, kion li serĉis, ĉar li ne ĝuste serĉis, li trovis nur „gregon kaj amason", sed ne la homon, fratojn, kiuj – liaopinie – prefere legas „ĉeval-librojn kun momentfotoj", kaj estas diletantoj malestimindaj. – La longdaŭran diskuton finis Lisaweta kun ĉi tiuj vortoj: vi estas vojerarinta burĝo.

El la jam menciita balo hejmeniris Tonio iom narkotite. La stranga renkontiĝo kun Inge agitis lin. Li revenis al si, kaj skribis al Lisaweta: vi pravis, kiam vi nomis min vojerarinta burĝo, mia burĝeco kaj amo al la „vivo" estas unu sama afero. Tonio trarigardante sian vivon vidis, ke burĝa deveno, vivo, stranga inklino al la arto estas miksaĵo. Li staris inter du mondoj, en neniu el ili li sentis sin hejme; admiris la Belon, kaj malestimis la homojn, parolis la lingvon de anĝeloj, sed ne havis sufiĉan amon, fariĝis sonanta kupro, aŭ tintanta cimbalo. Li vidis, ke tio, kion li faris, estas preskaŭ nulo, sed nun decidis: mi kreos ion pli bonan. Ekfaloj dum dancado, unu frazo dum diskutado: etaĵoj, tamen sorton-vivon formantaj.

La hungara poeto Sándor Reményik (Remenjik) verkis pri la vintra kverkfolio: kiam ĝi verdis, oni ne povis skribi sur ĝin. Nun la skribaĵo vidiĝas sur ĝi. „Necesis prujno, vintro, uragano / la neĝtalaro, por ke povu skribi / sur nin – kion ĝi volas – pova Mano"...

La traduko estas bonega, la libro nete prizorgita. Ĉi novelo de la elstara verkisto estas leginda por ĉiuj, kaj legenda por la junularo.

Julio *Varga*

★★★

Poeto debutis

Divershumore, originala poemaro de Rejna de Jong. Eldonis: Eldonejo Kardo, Glasgow, 1980. Ilustrita. 36 p. Prezo: l,50 t.

Inter la esperantlingvaj eldonaĵoj relative grandan proporcion ĝuas poemaroj. Unu el la plej novaj (kiun tamen, pro redakciaj malfacilaĵoj ni nur nun povas recenzi) donas duoblan ĝojon por poeziamantoj: ĉifoje temas ne nur pri apero de pli nova poemaro, sed ankaŭ pri *apero de poeto* – laŭ vera senco de vorto.

Entute tridek poemojn, – laŭ la titolo divershumorajn –, kaj fakte diverstemajn, diversformajn, diversetosajn enhavas la kvante modesta – far la aŭtoro ilustrita – volumo, sed jam ĉe la unuaj okulojn frapas la aŭtentikeco de la esperantlingva poeto, kiu egale regas kaj la lingvon, per kiu ŝi majstre ludas; kaj poezion, ĉu ŝi verkas en aŭ sen fiksaj formoj.

„Vibrante varme via voĉo / vivigis partojn de poem'; / ideoj, sentoj, sonoj svarmis, / ensorĉis min poeta ĝem'." – verkis la poetino en *Unuaj paŝoj* – kies titolo jam montras, ke ĝi estis ŝia unua esperantlingva versaĵo. Ĉu komenco, ĉu ne, la menciita poemo (kun interna aludo dediĉita al W. Auld) en si mem estas promeshava. Cetere efiko de Auld – kiu verkis la antaŭparolon – sentiĝas plurloke. Ne nur pro laŭformaj vidpunktoj (Rejna de Jong preferas samajn formojn, kiel la elektita poeto-modelo); sed koncerne ankaŭ la sekvindan, estimindan mondkoncepton, tiun de aŭtoro de „La Infana Raso".

Se kelkaj titoloj ne atestus pri virina eco de la poeto (Por mia edzo), neniu pensus, ke la aŭtoro estas *poetino.*

Sentoj intimaj, ĝenroj idiliaj kaj respondeco por estanto kaj por estonto de la homaro (Ekz.: „Al la italaj virinoj post kemia katastrofo, 1976, Sevesovo) sekvas unu la alian en la poemoj. La poetino sukcesas doni novajn impresojn eĉ en klasikaj soneta, rondela kaj hajka formoj, sed ankaŭ en ŝiaj „liberaj", t.e. ne fiksformaj poemoj (*Al neekzistanta kreinto*) radias poezio kaj simpatia „Arto Poetika" de poeto, vivanta por universalaj, tuthomaraj celoj. Tiu radiado efikas al la leganto, kerna optimismo de la poetino konvinkas ankaŭ nin:

„Kvankam malsaĝ' de homo ĝin subminas,
abundas, daŭras vivo kaj obstinas".
(Obstino)

Poeto debutis, mi komencis; kaj mi finas esprimante mian esperon, ke tiun ĉi debuton sekvos daŭra poezia agado.

Márton *Fejes*

recenzoj

Mesaĝo el Oriento

Hajka Antologio. Tradukis Hajkista klubo, kompilis Miyamoto kaj Ueyama Masaoj, eldonis L' Omnibuso, Kioto. 1981. 17 cm. 220 p.
Prezo: 15,- guldenoj

Dektri jarojn post siaj pli fruaj similaj, pli modestaj eldonaĵoj Hajkista Klubo nun aperigis ankaŭ antologion 220 paĝan. Krom antaŭparolo la libro enhavas ankaŭ studeton pri hajko, kaj pri historio de tiu ĉi ĝenro, aldone en Rimarkoj la leganto ricevas mallongajn klarigojn pri la por eŭropanoj ne memkompreneblaj geografiaj kaj personaj nomoj – ĉiuj ĉi laŭdas laboron de la redaktoroj: Miyamoto kaj Ueyama Masaoj. La redaktoroj ankaŭ tradukis gravan parton de la antologio; krom ili partoprenis la laboron: Murata Keinosuke, Tanaka Sadami, Tomita Tomu kaj Yamada Tenpu.

Antaŭparole legeblas: „Verdire ni baraktis en la diferenco inter ambaŭ lingvoj, la japana kaj Esperanto, sed ni estas feliĉaj, se nia laboro helpos eĉ iomete gustumi kvintesencon de la hajko." Post lego de la Antologio estas konstateble, ke en tiu ĉi barakto venkis la tradukintoj, eĉ malgraŭ tio, ke la japana lingvo ne konas rimadon, ili bone aplikis tiun avantaĝon de Esperanto.

Fine ni havas kolektaĵon, en kiu ni, Eŭropanoj povas legi hajkojn tradukitajn ne el angla aŭ franca tradukoj, sed el originala kaj far kompetentaj literaturistoj, kies gepatra lingvo estas la japana – kio estas la ebla plej perfekta solvo se la leganto ne povas legi la originalaĵojn.

La antologio dividiĝas je du partoj: en la unua ni povas legi verkojn de klasikuloj de hajko, inter ili de Matuo, Basyo kaj de liaj disĉiploj: Yosano Buson, Kobayasi Issa ktp. La dua parto enhavas la modernajn aŭtorojn de diversaj skoloj kaj tendencoj.

Tiom da hajkoj, kolektitaj en sama volumo, tamen povas kaŭzi por eŭropano ian monotonecon. Pro tio, kiam mi proponas al ĉiu esperantisto akiri tiun antologion, mi ankaŭ avertas ilin: oni legu po du aŭ tri tage, tiuokaze oni fakte ĝuos tiujn pensigajn perlojn de Orienta poezio.

Márton *Fejes*



De 30 jaroj je la servo de la loĝantaro

Korespondi deziras

Studentino Maria *Coramoto* pĉt, ekskursoj, *Caracas,* Av. Artes, Los Chaguaramos, Venezuela 1041. –– Studento Mario H. *Garcia,* pri futbalo, atletismo k.a. *Caracas,* Calle 15 Urb. Atlantida, Catia la Mar Vargas, Venezuela 1162. –– S-ro José Leonardo *Chirinos* pĉt, sportoj, pm, *Caracas,* Av. Intercomunal del Valle, Edif „E" 15, apt. 15-4, Venezuela 1090. –– S-ino Zaprinka *Zaharieva* (44), instruistino, *Belovo,* str. Stojan Sopov 8, BG-4470. –– F-ino Pavlina Sp. *Kjoseva* (20) oficistino, *Belovo,* str. Spartak 1, BG-4470. –– S-ino Veneta *Petrova* (30) instruistino, *Belovo,* str. Jundola 1. IV.11. BG-4470. –– F-ino Maria St. *Nenova* (37) sekr. de Patr. Fronto, *Momina Klisura,* BG-4468. –– S-ro Bonifacas *Ružele* (50) ktm pri psiĥologio, literaturo, arto, grafologio, interŝ. bk, pm, librojn k.a. *Panevežis,* Zemaičiu 21-28, Litovio-SU-235 307. –– F-ino Vija *Pommere* (30) ktm, kol. pm, bk, ins. *Ergli* str. Lenina 25, Latvio SU-229 240. –– F-ino Linkyte *Vida* (22) instruistino ktm, *Batakus,* Litovio SU-235 913. –– S-ro Panavas *Petras* (40) instruisto, poeto, ktm. *Utena,* Spalio 50-ĉ. 64-5, Litovio SU-234 910.

Servas por la faciligo de la laboro

la segilmaŝino
por viando kaj osto

– higiena
– potenca
– ekonomia



La segilmaŝino por viando
kaj ostoj taŭgas por tranĉado de viando,
ostoj, ostoplena viando,
fridigitaj viando kaj fiŝoj.
La maŝino funkcias per elektra motoro,
kaj plenumas la tranĉadon,
dispecigon per ronda bendsegilo.
La maŝino ne nur faciligas la laboron,
sed faras ĝin ankaŭ
pli altkvalita kaj ekonomia.

Teknikaj datoj:
Longo 535 mm
Larĝo 523 mm
Alto 845 mm
Pezo 48 kp
Dikeco de tranĉaĵoj min. 12 mm
maks. 165 mm
Alteco de tranĉaĵoj maks. 200 mm
Necesa tensio 3x380/220 V, 50 Hz
Povo de la elektra motoro 0,75 kW
Rotacinumero de la elektra motoro 1420 r/m

KERIPAR

„KERIPAR" Entrepreno Produktanta
Maŝinojn kaj Instalaĵojn por Komerco
Budapest VI. Népköztársaság u. 43. Hungario.
Telefono: 313–124
Telekso: 22–6237
Vendas: MÜÁRT kaj VOSZK

Iomete pri sciencoj

Sen finaĵoj, kvazaŭ nur „radikojn" konsistigas la nuna, ne tre facila enigmo (de s-ro Wojciech Jacek *Usakiewicz,* Varsovio). Alsendi sufiĉas la kvar plej longajn liniojn (H.4 kaj 5., V. 18. kaj 23.), krome V.6 kaj 24. (por havi iom da rimo). *Limdato*: unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **1.** Per plumoj remburita „sako" **5.** Fermita kurbo kun du fokusoj **9.** Ne tro bela ronĝulo, parenco de muso **10.** Laborista Esperanto-Asocio, inverse **11.** Figuro en kartludo **12.** Sciigo **14.** Melankolia lirika poemo **16.** Ofta prepozicio **17.** Parto de pluraj tabelvortoj **18.** Scienculo de praaj bestoj kaj vegetaĵoj **22.** Ne pli ol **23.** Scienco pri kemiaj medikamentoj **29.** Helena dio de ventoj **30.** Tre konata, inverse **31.** Parto de Britujo **32.** La kerno de la afero **33.** Okazas post V.24 **34.** Havenurbo en Brazilo **36.** Venas dum legado de nia Gaja Paĝo.

Vertikale: **1.** Skribsigno, duparta **2.** Nombro, inverse **3.** Falĉado postlasas sur la kampo **4.** Troa patriotismo **5.** Mezurilo de elektra potenccialo **6.** Superas la realon **7.** Mallongigo de la granda verko de Waringhien–Kalocsay **8.** Nepura korundo, kies pulvoron oni uzas por poluri, glatigi **13.** Gravita interna organo, miksite **15.** Miksita rimedo **19.** Iama turka oficiro **20.** Kap-part' **21.** Komencvorto de pluraj sciencoj, inverse **23.** Ruĝa frukto **24.** Bone trakti la gaston **25.** Facile knedebla **26.** Cedi **27.** Insulto **28.** Koleretigi

★★

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1981/6: SE DISPUTI KUN SINCERO – SE STARIĜI PRO AFERO – SE PARDONI PER ANIMO – SE FESTENI JAM SEN LIMO. (Aleksej Tolstoj, trad. Grabowski)

Libropremion gajnis per lotumado: Klaus-Dieter *Dungert,* Magdeburg, GDR; Atanas *Gaev,* Asenovgrad, BG; Boris *Kolker,* Ufa, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

— F-ino Urszula *Piasecka* (20) ktm, pri muziko, historio, vojaĝoj, interŝ. bk, gram. diskojn, *Konin* ul. Wyzwolenia 7/7, PL-62-510. — F-ino Barbara *Józniak* (24) ktm, pri literaturo, muziko, i.ŝ.pm. *Vroclavo,* str. Bona 16/16, PL-54-220. — Anglo, fraŭlo (34) lingvisto, prefere kun hungarino, interes. E-movado, lingvoj, vivfilozofioj, vojaĝoj. Geoffrey *Sutton,* p/a Ĉina Esp. Ligo, pk. 77. *Beijing (Pekino),* PR Ĉinio. — Nina *Titova* (40) konsultantino, pri literaturo, pĉt. precipe kun Hungario. *Moskvo* Ĉuksin tupik d.5, kv.68. SU-125 206. — Viktor *Podoljan* (17) ktm, pĉt, *Pjatigorsk,* Mal. Pereulok 13, p. Gorjačevodskij-1, SU-357 560. — Stefano *Nyesti* kaj *E-rondeto de unaj elektr. inĝenieroj,* pri kaj interŝ. fakaj aferoj, eldonĵoj, E-revuoj k.s. *Oradea* str. Cazabon 13, Bl. R47, ap. 10. R-3700. — S-ro Andres *Aruoja,* Kingissepa 11-41, *Kehra* (anonco en n-ro 81/5 aperigis erarajn ciferojn!), Estonio, SU-202 240. — HUNGARA HEROLDO, JUNA AMIKO arkolektojn kompletigi per aĉeto aŭ interŝ. deziras s-ro Ramón *Molera,* str. Sta Joacquina 13, *Moiá,* Hispanio. —



Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Tutmonda Sonoro

de Kálmán Kalocsay

„Tutmonda Sonoro" kronas la vivoverkon de Kalocsay. Per ĝi li faris la plej grandan donacon, kiun iu post Zamenhof iam faris al la esperantistoj. Kalocsay tradukis poemojn el 30 lingvoj, kaj tiamaniere li ankoraŭfoje elokvente pruvis, ke Esperanto estas lingvo viva, belsona kaj poezia.

1. Bonvolu daŭrigi la strofon:
   „Benitaj estu tag', monato, jaro,
   sezon' de..."
2. Kiu verkis la poemon „Odo al la juneco"?
3. Kiu poemo komenciĝas per la vortoj:
   „Jen ni: tagoj nevivitaj."

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1981/5: 1. En 1934. 2. „Mia vojaĝo en Faremido, mezurita per Tera tempo, entute daŭris preskaŭ unu kaj duonon da jaro." 3. „Kion do vi, virinoj volas – amon aŭ potencon? "

Libropremion gajnis: *Horváth* Béláné, Kalocsa, H; Jindřich *Tomíšek,* Rikovice, ČS.

En la n-ro 1981/6: 1. Helena, la Feino. 2. „morgaŭ". 3. „La ora saĝo".

Libropremion gajnis: Hans *Hofmann,* Jena, GDR; *Takács* István, Marcali, H. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

LETERKESTO

Malpacience? Prave, tamen... Surprizego frapis nian redakcian komence de aprilo: preskaŭ samtempe alvenis du telegramoj el malsamaj landoj, kiuj versŝajne reklamaciis la unuan numeron de HV – cetere tiutempe ĝi jam kuris sian poŝtan vojon. Nu, certe ne sian karieron, ĉar ne indas laŭdi nin mem pro la konstante prokrastiĝintaj aperdatoj; aliflanke la malpacienco de la abonantoj estas komprenin da, kaj ni ne volas ĝin percepti kiel flaton. Tamen... ke ambaŭ telegramoj tekstis *nacilingve* (itale kaj ruse), do ne E-lingve, tio ekmirigis nin. Kial, diable, oni kredis, ke ni scipovus tiujn *naciajn* lingvojn? ! Ĉu la estimataj abonantoj ne kuraĝis provi siajn E-konojn dum konceptado de mallonga telegramo? Ĉar, ni vere bedaŭras, sed paŝante *en la redakciejon ni tuj forgesas* ĉiujn aliajn lingvojn, kiujn ni iamfoje eklernis dum la vivo, kaj, eble tio surprizos iujn: „ni komprenas nur la Internacian Lingvon". Eo estas ja tutmonde oficiale akceptita lingvo por telegrafado, eĉ se foje oni devas pri tio konvinki iujn vilaĝajn poŝtoficistinojn. Por ilustri la suprajn per alia okazo: alvenis foje *anglalingva* letero de brita eldonisto, kiu certe estis profunde konvinkita pri la tutmondeco de sia gepatra lingvo. Nu, la respondon li ricevis ĝentile, sed en du *aliaj* lingvoj, paralele france kaj Esperante por helpi al li la komprenon – kaj prezenti al li ankaŭ ekzemplon pri la tn. „internacia ĝentileco" sur lingva tereno.

Haupenthal, Reinhard, FRG, *Saarbrücken:* En n-ro 1981/6 (p. 233) dank' al s-ano A. Holzhaus ni publikigis la – de multaj jam konatan – leteron de Zamenhof al Schleyer. Kvankam nia teksto ne aludis pri „unuafoja apero", ni tre volonte koncedas laŭ deziro de nia multmerita Esperantologo, ke estis li, kiu la unuan fojon publikigis tiun leteron en HORIZONTO. Estos eble utile por iuj scii, ke ankaŭ la originalo troviĝas ĉe s-ano Haupenthal. Pro la ĝustaj informoj akceptu varman manpremon.

Chvosta, Josef, CS, *Podebrady:* Ni eventuale havos foje kaŭzon por artikoli pri mondaj problemoj de l' instruado, se tio tuŝos la instruadon de Eo. Indulgon ni petas, se nuran informadon pri naciaj sistemoj de instruado oni ne trovas sur niaj paĝoj.

Buller, Osmo, Finnlando, *Oulu:* Ni konsideras tre respektinda kaj utila gesto, ke vi tradukis kaj publikigis en la Nordfinnlanda gazeto KANSAN TAHTO (Popola Volo) la tutan artikolon „Ekonomia kalejdoskopo" de V. Benczik (HV 1981/5). La eltondita artikolo montras ankaŭ zorgan emfazon de la esperantigo, de la fonto. Estas ĉiam grave, ke nacilingva gazetaro utiligu la mondvastajn eblojn de la E-gazetaro: tiuokaze por ĵurnalistoj kaj por la publiko okulfrape leviĝas la seriozeco kaj graveco de Eo, de „periferia, malgrava fenomeno" ĝi promociiĝas inter la pli kaj pli konsiderindaj. Vi faris gratulindan plenumon!

Pokrovskij, Sergeo, SU, *Novosibirsk:* Koncerne de la supre menciita kaj de vi alte aprecita artikolo vi prave lanĉas kelkajn uzitajn vortojn: „Optimumo" (trovebla ankaŭ en PIV) ŝajnas al vi superflue longigita: laŭ nia kompreno tiu UM ne identas kun nia sufikso -UM, sed kiel neŭtra formo de la latina adjektivo, ĝi origine signifas ĉ. „aĵon" - „la plej bona kazo/afero/aĵo". Ĝuste tial la jam oficiala OPTIMISMO ne signifas ekzemple tian ekonomikistan tendencon, kiu emus konsideri teorie nur la pintojn, la optimumojn: ĝi nomiĝas do OPTIMUM-ISMO; eble tio montras la diferencon! Temas do pri ekstremoj, same ĉe „minimumo kaj maksimumo". Kvankam la aŭtoro intencis distingi inter DISPROPORCIA kaj MISPROPORCIA – ambaŭ regulaj kunmetaĵoj – pro la disaj sencoj (ne misaj). ni ne kontraŭas, ke eble la unua formo ŝajnas malpli taŭga.

Kulagin, Teodoro, SU, *Moskvo:* Al la konata, ĉiam aktiva kaj fervoroplena veterano kun amika konsento ni kondolencas pro la forta sortobato, la perdo de lia edzino. Kiel montriĝis dumtempe, vi daŭre prenas energion el nia movado, kiu tiom da forto akumulas. La Dua Konferenco de ASE ree utiligis viajn spertojn kaj organizkapablojn.

Prof. Malheiros, Sylvio, Brazilo, *Rio-de-Janeiro:* „Frateco, amikeco, libereco, sincereco, laboro kaj progreso estas gravaj aferoj por la landoj" – kaj tiu citaĵo el via laŭdoplena, detale sincera letero al la prezidio de HEA jam karakterizas viajn profunde internaciajn-Esperantajn pensojn. Ofte ni sentas nin en la redakcio feliĉaj homoj, kiuj – kontraste al la neŭrologoj – ricevas eblojn legi tiom da esperoplenaj, optimismaj meditoj, tiom da humanismaj kaj homaranaj „konfesoj", kiuj farbas kaj orumigas niajn tagojn. Kaj kiujn detale, eĉ ope respondi, simple ne eblas pro manko de tempo, ĝuste pro la amase venantaj, instigaj kaj kuraĝigaj plej diversaj leteroj. Profunde ni dankas viajn homamajn vortojn, nian revuon detale aprecintan kritikon, en sia plena tuto!

Bálint István, H, *Kecskemét:* La informo pri Gyula Mészöly fama eksperto kaj selektinto de gravaj legomoj, grandsignifaj precipe en via regiono, estas niaflanke dankinda. Kvankam ni ankoraŭ ne rimarkis ĉe nia publiko apartan intereson pri botanikaj aferoj, vi sukcesis instigi nin, ankaŭ tiurilate atenti pli vaste. Ni vidos kion eblos fari. Varman manpremon kaj fortan sanon!

Bérci Darázs, R, *Cluj-Napoca:* La okazintan ortografian eraron en via nomo eble pardonigas iomete ĝia – en la hungara – duba kaj tradicie plurspeca skribmaniero. Sekve ne la preciza alilingva kompostisto, sed male, la hungara misdirektis sin facile sub viaj publikitaj fotoj. Akceptu niajn salutojn.

E.F.

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik. • Arta redaktoro: Judit Somhegyi. • Redakta komitato: Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. • Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. • Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonisto: Tibor Vaskó. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,-, al eksterlando por unu jaro 90,- forintoj. • Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H–1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. • Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: Tibor Vaskó. 820602 ÉTK Nyomdaüzem
Indexszám: 25 337 ISSN 0018–7704

NÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT·



Ĉu vi volas valoran,
belan donacon ?

Hungara Popolarto
en 80 vendejoj en Hungario !

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.